

Bô Yin Râ

LA MISTERO DE
GOLGOTA

KOBER'SCHE VERLAGSBUCHHANDLUNG AG
BERN

BÔ YIN RÂ
Joseph Anton Schneiderfranken

El la germana originalo
(„Das Mysterium von Golgatha“, 4a eldono, represo de la eldono de 1953)
tradukis A. Rehfeldt (<http://boyin-ra.org/esperanto/>)

Al la patrino de miaj infanoj

Enkonduko

Kiel mia libro „Pli da lumo“ estiĝis el apartaj traktaĵoj, tiel same tiu ĉi libro estas kolekto de ĉapitroj, certagrade en si fermitaj. Tamen mi deziras, ke tio, kion mi *tie ĉi* kunigas, estu konsiderata nur kiel *tutaĵo*, kaj se mi donas al la tuta libro *la titolon de ĝia unua traktaĵo*, mi tion faras pro tio, ke ĉio alia propradire *apartenas al tiu traktaĵo*.

Mi fidas al miaj legantoj, ke ili scias legi en tiu senco, kaj mi supozas, ke neniu aparta indiko estas necesa, por ke oni trovu la fadenon, kiu tiriĝas tra ĉiuj ĉapitroj, farante ilin memeksplikantan *tutaĵon*.

Inter tiuj, kiuj nuntempe strebas al spirita reviviĝado, sendube estas tre multaj, kiuj ekde sia plej frua juneco rigardis la altan majstron el Nazareto kiel dian instruanton, – al kiuj la „*mistero de Golgota*“ estis la centro de ilia kredo ...

En kelkaj el ili, eble ankoraŭ hodiaŭ *vivas* profunda kredo je Kristo, dum aliaj jam antaŭ longe, pro dubado kaj anima mizero, *perdis* tion, kio donis al ilia infaneco *lumon* kaj *certecon pri Dio*. – –

Sed mi pensas, ke mi povas al *ĉiuj* ĉi forlevi iun aŭ alian vualon, kiu ĝis nun kaŝis antaŭ iliaj okuloj tion, kio sola povas alporti finan konfirmon al la plej profunda sopiro de ilia koro. –

Devas esti senvualigata la profunda vero, kiu formis en la filo de Dio el Nazareto *vivon*, kiu ankoraŭ sendos la purajn radiojn de la *lumo* en plej foran estontecon, kiom ajn forte la nuna tempo nutras ne malmultajn dubojn pri la vereco de tiu vivo.

Dum la fluo de la jarcentoj, la plej diversaj bildoj malheligis la bildon de la „granda amanto“, de la alta majstro de la evangelioj.

Jam tiutempe, kiam lia piedo ankoraŭ migris tra la regionoj de Palestino, nur malmultaj sciis, *kiu li estis*, kaj tiuj, pri kiuj la sanktaj libroj parolas al ni kiel pri liaj disĉiploj, apenaŭ povas esti kalkulataj al tiuj ĉi malmultaj.

La vortoj de lia instruo, kiuj ĝis hodiaŭ konserviĝis, portas la kolorojn de ĉiuj, kiuj volis apogi per lia instruo *sian propran opinion* ...

Nur malmulto povas hodiaŭ esti rigardata kiel neŝanĝita sciigo pri lia vivo.

Kaj tamen eĉ la *ruinaĵoj* de la raportoj radiante sciigas pri *lumo*, kiu vere „ne estas el ĉi tiu mondo“, sed bezonis la agadon de „filo de *homo*“ por doni sin al la homo de ĉi tiu mondo.

En la fluo de la tempoj, *vero* kaj *legendo* metis sin antaŭ la *radiadon* de tiu ĉi lumo.

Praprofundaj *simboloj* serĉis *heliĝon* en ĝi.

Ĝi devis prilumi *malnovajn* kaj *novajn* aferojn, sed nur ekstreme malofte ĝi estis ekkonata en sia *vera esenco*.

Sed la dia instruo de la alta majstro ne heligos la plej profundajn profundojn al iu leganta la malnovajn raportojn, tiom longe, dum *la majstro mem* restas *kaŝita* malantaŭ la vualoj de la raportoj.

Tiuj nomantaj sin liaj servantoj estis spirite multe tro malproksimaj de li por *ekkoni* lin, kaj ilia zorgado pleje celis: – ne tuŝi malnovan sciigon.

Tiel povis okazi, ke nova tempo tro certa pri sia intelekta scio pridubis eĉ la *ekziston* de l' majstro.

Sed tiu, pri kiu oni raportas, ke li diris: „*Mi estas kun vi ĉiujn tagojn, ĝis la maturiĝo de la mondaĝo*“ – havis *alian mezuron* ol liaj *servantoj* kaj *alian mezuron* ol liaj *malkonfesantoj*.

Bone estas al vi, se vi dum la legado de tiu ĉi libro ekkonas liajn noblajn, purajn trajtojn!

Eĉ se vi *ne* nomas vin laŭ lia instruo – aŭ pli ĝuste laŭ la instruo kreita en lia nomo –, vi tamen apartenos al li, kiam vi ekkonis, kiu li vere *estis* – kaj *estas* ...

Tiam vi legos *aliamaniere* la raportojn, kiuj rakontas pri li, kaj ĉiu kaŭzo por dubado estos forigita el vi. –

Se vi estas kredanto de la malnovaj instruoj, kiuj konstruis *siajn* katedralojn sur *lia* instruo, tiam – se vi scias legi ĝuste – lia lumo heligos al vi la mallumon de iliaj haloj, kaj pli ol unu instruo, kiu estis peza ŝarĝo sur viaj ŝultroj, kiun vi ne kuraĝis tuŝi nur pro timo de sakrilegio, fariĝos al vi ŝarĝo kara, juvelo, kiun vi neniam deziros malhavi. –

De kie venis al mi la scio, kiun mi tie ĉi donas al vi, tion vi ekscios el tiu ĉi libro, – kaj vere doniĝos al vi scio, kiu baziĝas sur *vero* kaj estas malproksima de ĉia trompiĝo!

Mi ne volas fremdigi vin al via kredo, kaj vere honoras la piajn vazojn de la altaroj; – sed mi volas doni *enhavon* al via kredo, kaj neelĉerpeblajn putojn mi volas igi denove flui. –

Prenu do ĉi tiun libron kaj lasu ĝiajn vortojn fariĝi beno al vi!

Se vi trovas ion, kio unue ŝajnas al vi *fremda*, ne estu tro rapide preta fari iun decidon!

Vi devos legi *pli ofte*, ĝis la ŝutfermitaj ŝaktoj de via sentado povas *malfermiĝi*, – por ke la *vivaj akvoj* en la pra-fundo de via esto venu supren al la lumo!

Sciu, ke multaj jarcentoj ĵetis siajn „rompaĵojn“ en vian puton, kaj ke sole nur *vi mem* povas forigi tiun rubon. –

„Malsaĝuloj opinias sin grandaj,
kiam ili povas superi *aliulojn*,
sed la saĝulo malgrandigas sin,
por ke li povu superi *sin mem*.“

La mistero de Golgota

En la tempo de *Konfuceo*, vivis en la Mez-Imperio mistera saĝulo, kiun oni nomis *Laocio*.

Konfuceo, la granda instruanto pri la leĝoj de la feliĉa vivo, aŭdis pri li kaj ekiris por viziti lin. Reveninte de tiu vizito, *Konfuceo* silente iradis tien kaj reen dum tri tagoj, tiel ke liaj disĉiploj forte migris.

Sed *Tseu Kong* ekkuraĝis kaj demandis la instruanton, kial li senĉese silentas.

Konfuceo respondis kaj diris:

„Se mi rimarkas, ke homo uzas siajn pensojn por fuĝi for de mi kiel fluganta *birdo*, tiam mi uzas miajn pensojn kiel oni uzas sagon, kiun oni ekĵetas per arko.

Kun plena certeco mi trafas tian homon kaj ekmastras lin.

Sed se li volas eskapi min kiel rapida *cervo*, mi persekutas lin kiel lerta ĉashundo, certe kuratingas lin kaj ĵetas lin teren.

Se li volas eskapi min kiel *fiŝo*, glitante en la profundon, mi ĵetas mian hokfadenon kaj kaptas lin. –

Sed drako, kiu suprenflugas en la nubojn kaj ŝvebas en la aero, – tiun mi *ne* povas persekuti!

Mi vidis *Laocion* kaj li estas kvazaŭ tia *drako!*

Kiam li parolis, mia buŝo restis malfermita kaj mi ne kapablis refermi ĝin. –

Pro mirego mia lango pendis el mia buŝo kaj mi ne povis retiri ĝin. –

Sed mia animo ekscitiĝis kaj ankoraŭ ne rekvietiĝis!“

Tiuj malmultaj paroloj, konservitaj en la ĉinaj skriboj, reflektas sufiĉe klare la enorman impreson, kiun la spirita saĝeco de *Laocio* faris sur *Konfuceo*, kiu vere ankaŭ estis saĝulo, sed majstris sole en la regiono de la *intelekto*, dum *Laocio* trovis, *super* ĉia intelekta scio, sian spiritan hejmlandon. –

Estas raportite, ke la maljuna *Laocio* iris, je la fino de sia vivo, el sia lando okcidenten, – tien, de kie li iam estis ricevinta sian instruon ...

En la libro „*Tao te king*“, kiu estas atribuita al li, oni rajtas serĉi la esencon de lia instruo.

Oni kun certa rajto atentigis pri tio, kiom proksima tiu ĉi instruo estas al tiuj de la *Pitagoranoj* kaj al la filozofio de *Platono*; oni eĉ asertis la probablecon, ke *Laocio* ĉerpis el la saĝo de antikvaj *egiptaj* misteroj, kaj oni tiel konstruis la plej strangajn koneksojn.

Kiel preskaŭ ĉiam en similaj aferoj, ĉiuj ĉi konjektoj enhavas grajnon da vero, ĉar *Laocio*, kiun la plej granda profana saĝulo de sia tempo tiom admiris, estis unu el la malmultaj agantaj majstroj de la spirita unuiĝo, kiun oni simbole nomas la „*Blanka Loĝio*“, al kiu ĉiuj antikvaj misteroj kaj ankaŭ *Pitagoro* kaj *Platono* ŝuldis sian plejbonaĵon.

Sed dum tiu ĉi spirita unuiĝo kiel tia agadis tra ĉiuj jarmiloj nur en *spirita* maniero *el plena kaŝiteco*, tamen unuopaj el ili, kiuj vivis „en la mondo“, de tempo al tempo, kvankam *ekstreme malofte*, estis pretaj doni plej altan spiritan *instruon per parolo kaj skribo*, kaj unu el tiuj raraj estis tiu *Laocio*.

Ne senkaŭze li emfazas, ke saĝulo en sia instruo devas konformiĝi al *la tempo kaj cirkonstancoj*, ĉar li bone sciis, ke lia instruo povis esti komprenata en sia popolo kaj en sia tempo nur en formo, kiu trovos favoran akcepton almenaŭ ĉe la homoj inklinaj al spiritaj aferoj en tiu tempo.

Al *la tempo kaj cirkonstancoj* devis konformiĝi ĉiu el la tre malmultaj, kiu kiel membro vivanta en la mondo provis esprimi la instruon de la „Blanka Loĝio“ per vortoj, kaj ankaŭ tiu „*granda amanto*“, kiu nomis tiun instruon „*la bona mesaĝo*“, estis ne malpli konscia pri sia devo atenti *tempon kaj cirkonstancojn* kaj serĉi punkton de alligo por la gvidŝnuro de l' instruo *tie*, kie sekura apogo estis trovebla. Sed *sekura* apogo ĉiam estas samtempe *rezisto* ...

Oni komprenos la vivon, agadon kaj instruon de tiu plej granda amanto inter tiuj, kiuj nomas sin „*lumantoj de la Pralumo*“, „*vortoj de l' Vorto*“, nur tiam en ĝia tuta grandeco, se oni ekkaptis, ke ankaŭ li devis saĝe utiligi *tempon kaj cirkonstancojn*, kaj ke li – eble pli ol aliaj antaŭ kaj post li – provis trovi apogon je *rezisto*. –

Malproksima de mi estas la intenco ĝeni tie ĉi pian kredon, por kiu la majstro de la evangelioj fariĝis la ununura „filo de Dio“!

Kiu havas tiun kredon kaj esperas trovi savon en ĝi, tiu povas esti certa, ke lia espero ne trompas lin, *se* li lasas la instruon de l' majstro krei *vivon* en si, kaj ke la beno, kiu po-

vas doniĝi al li, neniam estas ligita al lia *opinio* pri la aferoj, kiuj iam kaŭzis la aperon de lia majstro.

Se li sentas sin *forta* en sia kredo, tiam li trankvile legu tion, kio estos donata tie ĉi, kaj rifuzu ĉion, kion la radikoj de lia kredo ne povas elteni!

Ju pli *forta* lia kredo vere estas, des pli certe li tiros novajn fortojn el tiuj ĉi sciigoj, ĉar: „*Kiu ajn havas*, al tiu estos *donite*, por ke li *havu abundon*“; – sed se li sentas sin *malforta* kaj *ŝanceliĝanta*, kaj se lia kredo estas al li nur malforta konsolo, kiun havas por doni la instruantoj de tiu kredo, ofte mem dubantaj kaj kondamnitaj al la devo instrui, tiam li preferu ne legu plue, ĉar estas ankaŭ skribite, ke „*kiu ajn ne havas*, for de tiu estos prenita eĉ *tio*, kion li *supozas havi*“. –

Sed kiu volas rigardi la vivinstruon de *Jehoŝŭa* el Nazareto, la rabeno ardanta en sankta amo, kiel pian legendon aŭ eĉ dubas, ĉu tiu ĉi homo unuigita kun Dio iam vivis, al tiu estos dirata tie ĉi iom de tio, kion scias pri li tiuj, kies „frato“ kaj komisiito li estis, – li, pri kiu oni raportas, ke li instruis „ne kiel“ la instruantoj de sia tempo, – ke li parolis „kiel iu havanta aŭtoritaton“ – ĉar estante tio, kio li estis, li tute ne *povis* paroli aliamaniere, se li ne volis fariĝi malvera antaŭ si mem. – –

Kiom ajn la raportoj pri lia vivo kaj lia instruo devis enpreni da mistikaj aldonaĵoj, tamen ankoraŭ restas pli da reala donitaĵo por konsiderado, ol racionalisma kritiko, kiu scias nenion pri pli profundaj interrilatoj, povas akcepti laŭ pure eksteraja vidpunkto. –

La vivo kaj instruo de tiu viro, kiu dum preskaŭ du jarmlaĵoj fariĝis „dio“ al la popoloj de Okcidento, neniam estos sondeblaj nur per filologia esplorado de fontoj, kaj la kon-

struaĵo, kiu kiel „kristanismo“ leviĝis sur la bazo de tiuj vivo kaj instruoj, estas – malgraŭ kelkaj strangaj formoj – tute ne tiom malplena je simboloj de plej alta ekkono, kiel iuj el ĝiaj malestimantoj ŝajnas bonafide supozi.

La purigo, kiun la honesta, fortoplana Aŭgustena monaĥo de Vitenbergo* alstrebis siamaniere en sankta simpleco, ne povas esti rigardata por ĉiam kiel sukcesa verko, kaj oni ne povas, estante blinda pro respekto, koncedi al lia naiva kredo pri Dio kaj diablo la spiritan ekkonon, kiu estus estinta necesa por fari *realan* „reformacion“ kaj por zorgeme protekti plej profundajn simbolojn, kiuj estis nealireblaj al li. –

La ago, pri kiu li *kredis*, ke li faris ĝin, ankoraŭ estas iam farenda, kaj en *alia* maniero ol *li kapablis*, malgraŭ la forto de sia granda volo ...

Sed *li* devis krei la *grundon*, sur kiu iam trovos sekuran starejon *tiu*, kiu surbaze de plej profunda ekkono povos plenumi tiun agon.

Nur tiam la praprofundaj misteroj de la kristanismo, elfositaj el ŝutpleniĝintaj ŝaktoj, estos evidentaj al la tuta homaro, kaj ilia lumo finfine forigos la malhelon, kiu por tiom multaj neirebligis la vojon, kiun la majstro el Nazareto pretigis en si mem por ĉiuj volantaj sekvi lin.

Nur tiam oni komprenos, kial *tiu* saĝa *amanto* havis la rajton diri al la siaj:

„*Sen mi vi nenion povas fari!*“

Tial li nomis sin mem la „*vinberarbo*“ kaj la siajn la „*branĉoj*“; – tial li postulis, ke ĉiu, kiu volas havi en si „*la vivon*“, devas enpreni en sin *tion*, kio fariĝis „*karno kaj sango*“ *en li mem*, en la majstro.

* Martin Luther (1483–1546) (Rim. de la tradukinto)

Vere, tie ĉi kuŝas *pra-funda saĝo*, sed ĝi povas esti trovata nur, se oni scias, *kiu* estis tiu „filo de *homo*“ kaj de kie li venis. Kiu tion plene ekkaptas, tiu mirante fine vidos, ke la „*dogmo*“ tute ne estas elradikigata per la *vero*!

Tiuj, kiuj de antaŭ jarcentoj opinias, ke ili devas protekti ĝin, ne suspektas, ke ĝiaj radikoj *etendiĝas multe pli profunden ol ilia kredo penetras*, kaj ke sub la flugsablo de teologia spekulacio, kiun ili ree kaj ree kribras, estas trovebla sukoriĉa, eterna grundo, kiun ili ne malkovras nur pro tio, ke ili en neutila ludo ne laciĝas desegni magiajn figurojn en la sablo de la supraĵo, kredante, ke sole el la magia forto de tiuj signoj ekkreskas la savo, kiun la majstro iam promesis al ĉiuj, kiuj volas unuigi sin en li.

Pia kristano vidas en la majstro, laŭ kiu li nomas sin, la ununuran „solenaskitan Filon de la Patro“, sed la majstro mem, „plena de graco kaj vero“, diras, ke en la domo de lia patro estas „*multe* da loĝejoj“, ke ne apartenas al *li* decidi, kiu sidu dekstre de li kaj maldekstre en la regno de lia patro, kaj ke „la Patro estas *pli granda*“ ol li.

„Kvankam mi atestas *pri mi mem, tamen* mia atesto estas vera; ĉar mi *scias*, de kie mi venis, kaj kien mi iras; sed vi *ne* scias, de kie mi venis, nek kien mi iras.“ –

Eĉ hodiaŭ nenia meditado aŭ kredado ekkaptos lin en lia prapropa esto, escepte se la meditante aŭ kredanto *scias*, „de kie“ la majstro venis kaj „kien“ li iris, – scias, ke tie ĉi staras antaŭ li unu el la „*lumantoj de la Pralumo*“, alte respektata kaj admirata de liaj „fratoj“ eĉ hodiaŭ kiel la *plej granda „amanto*“ inter ili, elirinta el ilia rondo kaj reveninta en ĝin por, en nevidebla formo, restadi en la aŭro de la tero, ĝis la

lasta el la homspiritoj, kiuj tie ĉi vivas en la animalo, eniris en la lumon. –

Kion ajn unu el tiuj „lumantoj de la Pralumo“ eble diras *pri si mem* por „atesti pri si mem“, tion li diras *kiel reprezentanto de la eterna, spirita mult-unueco*, en kiu li estas. Lia diro aplikiĝas samtempe *al li mem kaj al ĉiuj*, kiuj *unuigite* kun li formas la unuiĝon de la „lumantoj de la Pralumo“. –

Sen la estado de tiu kosma-spirita *unuigo*, la spirita „homo“, kiu rezulte de la „falo“, rezulte de la propra impulso perdis la vojon kaj atingis alian „dimension“, estus jam antaŭ longe subfalinta al plena vualiĝo de la spirita konscio en la terhoma animalo, vualiĝo, kiu estas la eterna kaj sola reala „morto“: la dissolviĝo de lia sentado kiel spirita individuo, la reveno en la senforman „kaoson“, la esto-nokton de la profundo, el kiu li iam leviĝis, fariĝinte formo, „generite“, ne „kreite“, en tiu profundo eterne formanta sin mem. – – –

Eterna amo, ardanta kiel neimageble potenca fonto de luma fajro meze de la pra-funda „kaoso“, – eterna „Pralumo“, – prononcas sin mem kiel „Pra-Vorton“, en infinitobla „eĥo“ kvazaŭ *aŭdante sin mem en infinitobla memmanifestiĝo*. –

Tiel „la ‚vorto‘ de la Eternulo aperas al ĉiuj landoj“, kaj en *ĉiu* el tiuj „vortoj“ ĝi fariĝas al si mem adoranta „respondo“, en *ĉiu* la ardanta „suno“ estigas el si sian „planedosistemon“, – la individuigitan „Diecon“ de la individua spirito, kiun ĝi plugenerante naskas el si ...

El tiu „koro de Dio“, lumfajra centro de ĉiu esto, fontofundo en la senforma „kaoso“, kiun povas ampleksi neniu homa vorto, escepte se oni nomas ĝin: „la amo, kiu estas el si

mem“, – – originas la „plano de savo“, *de eterne bazita en la amo*, plano kiu formas la mult-unuecon de la „lumantoj“, por ke ĝi savu tion, kio ŝajnas perdita, revenigu en beatan esto-certecon tion, kio disigis sin mem kaj tiel perdis la sentadon de sia propra formo. –

Devigite paroli en teraj *bildoj*, mi bone scias, ke iuj homoj, fiere, certe, kaj ĝojante pri sia nocia ekkonado, deklaras ke tia okazado en tio „eterna“ estas „absurda“, sed tio *reale* „eterna“ estas io alia ol la *nocio*, kiun *intelekta imagado* kreis al si, kaj *neniu* saĝo de l’ *intelekto* iam kapablos formi *tiun* nocion, kiu tie ĉi plene konformas al la *realo*.

Nur en *plej profunda sentado* tiuj „estantaj de bona volo“ povas senti *iomete*, kio tio eterna *reale* estas, kaj ĉiu volo spekulative elpensi ion *devas* frakasiĝi je *tiu ĉi* realo. –

El ĉiuj homoj vivantaj surtere, nur iu, kiu *trairis la vojon returne, tien*, de kie li iam *eliris* en spirita formo, povas doni veran ateston pri tiu „realo“.

„*Neniu venas al la Patro krom per mi!*“

Kiu formis tiun vorton, apartenas al la malmultaj, kiuj spertis la realon „*okulon ĉe okulo*“, longe antaŭ ol ili surtere eniĝis en la korpo de homa animalo, el kiu ili povas instrui tion, kion „la Patro“ ordonas al ili instrui.

Ĉiu el la „lumantoj de la Pralumo“, sed nur, kiu apartenas al ili *el la forto de, kaj senditeco fare de, la „Pralumo“*, rajtas, pro plej interna *spirita egaleco*, uzi la *saman* vorton *pri si mem kun la sama signifo*, kiel ĝi estas raportita pri la majstro de la evangelioj, kaj tamen ĉiuj liaj fratoj honoras en li *tiun*, kiu superas per sia *amoforto* ĉiujn, kiuj ĝis nun paŝadis sur tiu ĉi tero. –

Kvankam *ĉiu* unuopa, kiu iam apartenis al tiu unuigo, vivas el la amo, ankoraŭ ekzistis neniu, kiu estus tiel *prezentinta sian tutan eston transfiguritan en amon al la mondo por viva helpo*, kiel tiu *ĉi*, kiun ili mem nomas „*la granda amanto*“.

Nur malmultaj homoj suspektis, *kion* li donis al la homaro.—

Lia ago tiom superas *ĉiun* homan komprenkapablon, ke tiuj unuaj, kiuj suspektis la *grandecon* de tiu *ĉi* ago, devis por si mem fari lin *dio*, por ne senti sin *tro premŝarĝita* de tia grandeco de *homo!* — — —

Sed lia ago de liberigado ne bezonas la miton, kiu rakontas pri venĝema tribo dio sendanta sian „filon“ kiel homon al la homaro, por ke lia propra soifo je venĝo estu kontentigata de ilia krueleco.

Tio, kion tiu *ĉi* „*granda amanto*“ prezentis al la homaro kiel heredaĵon el la regno de l' spirito, vere estis io alia ol tiu „kontentigo per anstataŭanto“, kiun neagema bezono de savo elpensis al si, por ne plu senti en si la devon al propra agado.—

Je la kruco de Golgota la mondo estis *vere* „*liberigata*“ el ligiteco, kvankam en tute alia maniero, ol la suspektantoj provis kompreni tion! —

Kiam la majstro el Nazareto fine, sur la romia krucumilo, *suferis* la morton *ĉiam serĉatan* de li en liaj plej altaj horoj, li plenumis ion *tute nekompareble* pli grandan, ol faris antaŭ kaj post li ne malmultaj, kiuj oferis la surteran vivon al sia konvinko.

Tiu, kiu mortis je la krucumilo sur Golgota, tiuloke estis la sola, kiu kun plena klareco *sciis*, kio okazis, kaj li *sola* estis *kapabla* perforte rompi la riglilojn, kiuj fermis la pordon al libereco por la *spirita homo* ekde la tempo, kiam li, en la animalo de tiu ĉi tero, subfalas al la instinkto kaj inklino de tiu animalo tiugrade, ke la liberigo el la sorto de la animalo ŝajnis apenaŭ plu ebla. –

Nur „*scianto*“ povis *ekkoni*, ke estis *eble* per plej alta ama ago de homo, denove *veki* spiritan forton en la sfero de homa potenco, vekti ĝin *tiumaniere*, ke ĝi fariĝu *ekkaptebla* al ĉiuj katenitaj de la minace ĉirkaŭvolvanta planto de animalaj vivoinstinktoj, – ke nur homo, kiu estis kunfandinta la animalon kun tio sia *spirita en novan eston*, povis prepari la vojon por tiuj volantaj sekvi lin. –

Certe: tiu ĉi „*scianto*“ devis samtempe esti *amanto* en ekstreme granda mezuro por povi *plenumi* tiun agon, ĉar tre multaj antaŭ li havis la saman scion kaj tamen ne kapablis superi la hororon antaŭ tiu ago, kvankam ankaŭ ili certe ne estis sen amo. – –

Tiel *Jesuo el Nazareto* malfermis la vojon al la spirito por ĉiuj, *kiuj volas vivi en si mem tion, kio estis lia vivo*. –

En li, la *dio* en la animalo estis *unuiginta al si la animalon* en tiu *nova* esto, kiun li kutimis nomi „*filo de homo*“, la „*filo*“, kiun la *spirita homo* generas en la animalo, kiam li superis la animalon, kiu katenis lin, – superis ĝin per tio, ke li malkaŝis al ĝi sian forton kaj sian belecon. –

En *ĉiu* el la „lumantoj de la pralumo“ okazas la *samo*, sed neniu el ili trovis en si *la supermezuron da amo*, kiu estus kondukinta lin al tio, ke li faru la agon, per kiu la majstro el Nazareto vekis al nova vivo *forton*, kiun de post tempo ne-

memorebla la plejsaĝuloj penadis akiri dum sia tuta vivo, sen esti kapabla utiligi ĝin al aliuloj en la sama maniero. –

Ne lia *morto kiel tia* kaŭzis la renovigon de tiu forto en la spirita aŭro de la tero, kaj ne per la torturo antaŭ lia morto tiu renovigo estis efektivigata.

Sole *la forto de la amo* povis plenumi la miraklon! – – –

Ke li, kiu suferis torturon kaj morton, povis „pardon“ la homaron, *pardon ĝis la lasta stertoro de agonio*, tio sola estis lia efika „ago de liberigo“. Ĉar tie ĉi la spirita homo, – kie ajn li vivas sur la tero kaj, venkite de la animalo, implikiĝas en kulpo, – laŭ spirita leĝo estis malligata *disde lia dependeco* per la amo, kondiĉe ke li *ekprenas* la manon, kiu prezentiĝas al li por helpo, kaj kondiĉe ke li tion, kio estis fariĝinta „*karno kaj sango*“ de la lumanto, *enprenos en si por unuigi en si la animalon kun la spirito* ...

Nur iu, al kiu „*ĉio estis transdonita de la Patro*“, kapablis doni *tian* „pardonon“, kia ampleksas la tutan homaron.

Profunda vero kaŝiĝas en la vesto de la tradicia mito, laŭ kiu post sia morto la majstro „malsupreniris“ al la animoj de la justuloj de la antaŭa tempo, ĉar la *sekvo* de lia ago ne estas ligita al iu specifa tempo, sed fariĝas sentebla al la antaŭ longe mortintaj same kiel al tiuj, kiuj naskiĝos post jarmiloj. –

Multo de tio, kio devas esti dirata tie ĉi, eble ŝajnas esti absurda malsaĝaĵo al tiuj, kiuj povas akcepti nur tion, kion iliaj animalecaj sensoj perceptas.

Ili ne povas kompreni, ke la *ago de unu sola homo* povis ŝanĝi la spiritajn eblecojn por *ĉiuj homoj*.

Kiu tie ĉi ne povas aŭ ne volas sekvi, tiun mi vere ne provas „konverti“!

Mi nur memorigas al li, kion la tuta nuntempa homaro ŝuldas al certaj unuopuloj en *tiuj* regionoj, kiuj estas fiziksense percepteblaj al ĉiuj. –

Ke unuopulo destinita por tiu tasko povas agi multe pli sekvoriĉe de la *spirita* flanko, estas kaŝita al la *ekstera* rigardo, kaj *nur* tiu, kiu *mem* ricevis la taskon agadi *en la spirito kaj de la spirita flanko*, povas ekkoni iometon de tio. –

Sed kiu profunde sentas, el la fundo de sia animo, ke la majstro el Nazareto estas la granda aganto de faro, kiun neniu aliulo iam agis por la homaro, tiu en sankte solena horo esploru kaj demandu sin mem, ĉu li volas utiligi la frukton de tiu faro *per propria ago*: – per tio, ke li alligas *sin mem* al la forto, kiun la majstro nove vekis, per tio, ke li tiras *sin mem* el la dilemo inter dieco kaj animaleco, – per tio, ke kun forto kaj en vero li *enprenas en sin* tion, kio en sia majstro estis fariĝinta „*karno kaj sango*“, por ke ĝi efektivigu ankaŭ *en li* la unuigon de tio terhoma kun tio dia!

En la fluo de jarmiloj, kelkaj grandaj faroj de noblaj kaj elstaraj homoj jam perdiĝis el la memoro de la homaro, sed la plej malfrue venontaj generacioj sur tiu ĉi planedo ankoraŭ scios pri la *mistero de Golgota*; oni eĉ povas esperi, ke ili sentos multe pli de ĝi, ol ĝis nun povis riveliĝi.

Tra ĉiuj tempoj brilas kiel radiantaj lumajĵo de nekompreneble granda amo tiu ĉi vorto el la evangelio: „*Patro, pardonu ilin; ĉar ili ne scias, kion ili faras!*“

Nur „lumanto de la Pralumo“ povis paroli ĝin, kaj tamen kuraĝis fari *tion*, kio estis *kondiĉo* de tiu parolo, neniu krom tiu unu, – la „*granda amanto*“ ...

Ankoraŭ *hodiaŭ* kaj *ĝis la lasta tago de homa vivo sur la tero* tiu ĉi „*granda amanto*“ – en spirita formo, unuigita kun

ĉiuj, kiuj kun li formas la spiritan ĉenon, kiu ligas tion pere-
ontan, sense percepteban, kun tio eterna – estas *proksima al*
la animoj, kiuj lin vokas!

„Kiu povas tion akcepti, tiu akceptu!“ –

Kiu tion ĉi skribis, atestas pri li, same kiel li povus atesti
pri la ekzisto de la suno ...

Neniu membro de la mult-unueco de „lumantoj de la Pra-
lumo“ estas iam disigita de la aliaj membroj de tiu spirita
komuneco, neniu agas el si sola!

Ankaŭ *tiu*, kiu antaŭ du mil jaroj kun amo kaj forto sciigis
la „*bonan mesaĝon*“ al siaj nesufiĉe saĝaj disĉiploj, agis kaj
agas, – kiel pli frue, tiel ankoraŭ nuntempe, – *neniam el si*
sola. – –

Ankaŭ li obeas la ordonon, kiu doniĝas al li, *same kiel al*
ĉiuj liaj fratoj, el la „*Pravorto*“, kies „*vortoj*“ estas ĉiuj *tiuj*,
kiuj, unuigitaj kun li, agas sur tiu ĉi tero. –

Ankaŭ li estas subulo de „*la Patro*“, – la spirita estaĵo, alte
sublima super ĉiu komprenkapablo, kiu estas la „*majstro*“ *en*
ĉiu de la „*lumantoj*“, – la sankta estro de ĉiuj fratoj surtere,
tiu *Nenomebla*, kiu *estas* kiel li *estas de eterne ĝis eterne*, –
restadanta en la „*Pra-Vorto*“ kaj tamen ĉiam ĉeestanta en
spirita formo al la „*lumantoj*“ de tiu ĉi tero, malkaŝita al ilia
vidado, kaj *faranta la verkon de la eterna amo per* ĉiu el ili,
depende de ties fortoj, ties naturo ...

Unuigitaj en tiu *Nenomebla*, – en kiu la *unua* memsentado
de la „*Pravorto*“ fariĝas *formo* kaj *efiko*, – estiel la „*Vorto*“,
kiu estas „*kun Dio*“ kaj *kiu estas* „*Dio*“ en la dieco, – ĉiuj

„lumantoj de la Pralumo“ eterne estas nur *unu* laŭ volo kaj konscio! – –

Unueco estas volboŝlosila ŝtono kaj krono de fundamenta multeco en ĉia vivo en la spirita-kosma esto, same kiel la multeco de koloroj montriĝas unuigita en pura blanka lumo.–

Infinitoble efikas tio unu, kio estas ĉio, por retrovi sin en unueco, sen iam oferi sian senfinecon. –

Amo estas la plej interna origino de tiu esto!

Amo estas ĝia neniam finiĝanta vivo!

Amo estas ĝia praeterna agado!

Sed tiu mortinta sur Golgota estis la *plej perfekta vazo* por la amo, kiu iam prezentis sin surtere, *por la amo, kiu estas senfina, kvankam ĝi en si mem konas siajn limojn ...*

Bone estas al tiuj, kiuj *ekkonas* lian vorton *el sub* ĉiu ŝutkovraĵo!

Bone estas al tiuj, kiuj scias trovi *lin mem* en sia plej interna koro!

*

*

*

La plej terura el niaj malamikoj

Mi ne parolas pri la teruraj *eksteraj* militoj, kiujn la „*animalo*“ en la tera homo ree kaj ree provas ekflamigi por mortigi aliajn homojn, – mi pensas pri *multe pli kruela* milito, kiu povas ekflami en ĉiu homo, tiam furiozas en lia interno, kaj en kiu nur malofte iu restas „*venkinto*“. –

Tiu milito komenciĝas, kiam unuafoje leviĝas en homo la demando: „*Kiu mi estas?*“ – kiam unuafoje tiu „*mio*“, al si mem nekonata, rigardas en la oscedante avidan faŭkon de ŝajne nepenetrebla tenebro, serĉante la *kaŭzon* aŭ *celon* de la ekzisto, serĉante spurojn de sia *origino* aŭ antaŭsignojn de siaj *finaj celoj*. –

Pro tio, ke la homo kutimiĝis solvi ĉiujn demandojn „*laŭ-intelekte*“, tute ne venas en lian kapon la ideo, ke la solvado de la demandoj nun vekiĝintaj en li povus esti rezervita al *alia* spirita forto en li.

Certe, *lacaj* aŭ *neagemaj* animoj baldaŭ trovas elirejon, kiun ili nomas „*kredo*“, sed tio, kion oni kutimas kompreni sub „*kredo*“, estas nur pli facile ekhavebla kontentigo de kontentiĝema *intelekt*o, neniam *tiu alta forto*, kiun la sciantoj de ĉiuj tempoj forte laŭdis, kiam ili parolis pri „*fido*“ ...

Tie ĉi la intelekto *kontentigas* sin per solvo *ricevita de aliuloj*, ĉar ĝi *ne povis mem* penetri ĝis la solvo.

Oni povus plenigi grandegajn bibliotekojn per la libroj skribitaj cele de tiu trankviligo de l' intelekto, ne konsiderante la personan penadon de tiuj, kiuj mem kontentigis sian intelekton per kvietigaj sciigoj de *aliuloj* kaj nun opinias, ke

ili havas la devon prediki „la savon“, kiun *ili* kredas esti trovintaj, ankaŭ al siaj kunhomoj.

Tiel oni povas instrui nur tion, kion la intelekto povas *ekkapti*, kaj se la intelekto *povus* sukcese solvi tiujn finajn demandojn, tiam ilia solvo jam *antaŭ longe* estus klare prezentita antaŭ ĉies okuloj en la tuta mondo.

Sed la intelekto estas nur *ilo* de la homo kaj ne devas fariĝi *mastro* de sia posedanto, alie ĝi fariĝas lia *plej terura* malamiko.

Diamanto servas por tranĉi vitron, sed ĝi estas neutila por faligi arbojn, kaj kiu bezonas lignon por konstrui sekuran domon, tiu en vintra ŝtormo malgraŭ sia diamanto povas frostmorti. –

Vi „*serĉas*“ per la intelekto kaj opinias la naturon kruela, ĉar ĝi ne donis al vi okulon por rigardi en ĝiajn finajn, misterajn profundojn, dum vi *havas* tiun okulon *kaj ne scias pri ĝi*, en via tuta riĉeco.

En ĉiuj tempoj ekzistis *kelkaj* homoj, kiuj *sciis* pri tiu okulo kaj kapablis *uzi* ĝin.

Se ili diris al vi aliaj, kion ili vidis, oni misfamigis ilin kiel malsaĝulojn aŭ troentuziasmojn.

Sed se ili diris al vi, kiel *vi mem* povas trovi tiun ĉi okulon en vi kaj lerni uzi ĝin, ili ekĝenis vin, ĉar ili postulis *tromulton* de vi, kaj tio tute ne plaĉis al via *inerteco*.

Prefere vi „*kredis*“ je la instruoj de sciantoj, *post kiam vi krucumis la instruintojn*, – ĉar poste vi povis interpreti tiujn instruojn kiel plaĉis *al vi*. – –

Vi diras: „Estis *aliaj* homoj, kiuj faris tion, – *ne ni, – ne ni!*“ – sed pro bonaj kialoj mi dubas, ke hodiaŭ *vi ekkonus* tiujn, kiuj povus helpi vin. –

En ĉiuj tempoj la homo preferis atendi la venon de „helpanto“ laŭ *sia* deziro kaj ne volis aŭdi pri la *veraj* helpantoj, kiuj *en bonkoreco kaj simpleco* prezentis al ili la manon por helpo.

La *fantazio* de l' homo kreas potencajn „titanojn“, „diojn“ kaj „sanktulojn“, kie nur *la simple plej homeca homo* taŭgas por liberiganto.

Magiaj artoj estis ĉiam rigardataj kiel pli valoraj ol la plej benoplenaj instruoj de vere *vokitaj* helpantoj.

Oni volas miregi, kaj plej volonte lerni „la sorĉadon“, dum oni en kvieto kaj interna enprofundiĝo devus provi veni *al si mem*.

Koncize: la „metodo“ por fari tiun internan okulon taŭga por vidi estas tro *simpila* por la fantazio de l' homo; kaj veni al ekkono en tiu nova, sobra maniero tro forte malkonformas al lia kutimo.

Jam tro longe li estas sklavo de l' *intelekto*, ol ke li ankoraŭ povus suspekti, kiel li povas *paŝadi eĉ sen* katenoj kaj plum-baj pezaĵoj je la piedoj, kaj aĥ: – la *flugadon* per flugiloj de la animo li jam antaŭ longe mallernis.

En la *ekstera* mondo la intelekto havigas al li malfortetan *surogaton* por ĉio, kion la animo serĉas, kaj sekve la homo miregas antaŭ la „miraklaj faraĵoj“, kiujn la *intelekto* helpis al li elpensi, kaj tiel perdas la lastan kredon pri la *ebleco* iam *anime* akiri plenumon de la sopiro de sia animo.

Kaj tamen nenio, kion la intelekto igas lin trovi ekstere, povas iam plene subpremi la *krion de la animo*, la animo, kiu

havas siajn rajtojn en *sia* regiono tute same, kiel la intelekto la siajn *tie*, kie temas pri *komprenado*. –

La ekkonoj de la animo volas esti ne „komprenataj“, sed *vidataj, sentataj, spertataj kaj konkerataj*.

Tie ĉi la *intelekto*, kiom ajn akrigita ĝi eble estas, ne taŭgas kiel ilo!

Tie ĉi devas ekaktivi *nova* forto, kiun potenciale posedas ĉiu homo, kaj kiu tamen *disvolviĝas en nur tre malmultaj!*

Ne ekzistas germana vorto por tiu forto, kaj tiuj, kiuj estis disvolvitaj ĝin en si, inventis nur „nomojn“ por ĝi, kiuj ne havas ion por diri al aliaj homoj.

Tio, kion la germanoj nomas „*Gemüt*“, eble povus konduki en tiun *regionon*, en kiu estas kelkfoje eble *senteti* tiun forton, sed oni alligas al tiu vorto kaj al ĝia signifo tiom da *nebulaj aferoj*, ke eĉ tiu ĉi hezita indiko povas konduki al granda eraro.

Mi volas provi, per diversa *parafrazado*, nun *gvidi* la animon al la *esenco* de tiu forto; – eble iu aŭ alia leganto sentas en si ion softe vekiĝi, ion, kio, kvazaŭ ĝermo en floro, iam aperigas tiun forton en li.

Sed mi scias, ke mi metas al mi taskon, kiu apenaŭ iam estas kontentige solvebla, se ne *ambaŭflanke* ekzistas la serioza, profunda *volo atingi* la celon trans ĉiujn obstaklojn.

Sed la plej terura *malamiko*, kiu povas renkonti nin sur tiu ĉi vojo, estas la *intelekto*, – tiu eterna, kutimiĝinta *volo kompreni* la celon, dum tie ĉi povas plejfavoraokaze temi nur pri komprenado de *vortoj*, kiuj celas *indiki* la *direkton* al la celo.

Kiu volas plue iri kun mi, tiu antaŭ ĉio faru sin *mastro* de sia intelekto kaj ne donu al ĝi rajtojn tie, kie ĝia taŭgeco *finiĝis!*

Sed kiel mi nun senvualigu al vi la esencon de tiu sennoma forto, kiu alportu al vi liberigon?!

Provu legi tiujn ĉi vortojn ree kaj ree, malproksime de ĉia bruo kaj ĉia distrado fare de la ekstera mondo, – sed provu ankaŭ trankviligi vian menson kontraŭ la laŭtaj *paroloj kaj objektoj de via pensado*, kaj en plej profunda trankvilo donu vin al via sobra, memcerta *sentado!*

Legante tion, kio tie ĉi sekvos, provu en plena trankvileco *senti vin mem!*

Vi devas provi senti vin simile al stato, en kiu vi sentas vin, kiam en vespera krepusko kara kaj longe ne aŭdita melodio neatendite alfluas al vi el la foreco, ektuŝas vian koron, kaj tiras vin kun si en la milda ŝvebado de ĝiaj tonoj..

En tiaj horoj, tiaj momentoj, iomete malfermiĝas la pordo, tra kiu vi iam devos paŝi, se vi vere volas proksimiĝi al la forto, kiu povas doni respondon al viaj finaj demandoj. –

Kun amanta okulo enprenu la delikatan lumradion, kiu eliĝas el la fendo de l' pordo, kaj provu alkitimiĝi al ĝia milda lumo!

Ne volu „ekkoni“ *per unu fojo* la tutan helecon, kiu estas malantaŭ la pordo, sed bridu viajn dezirojn kaj unue kapabligu vian okulon, ke ĝi lernu *distingi* la *specon* de tiu milda lumo disde *ĉiu alia* lumado ...

Vi baldaŭ malkovros, ke vi ĝis nun *neglektis* ion, kio estus inda je zorga flegado. –

Iru kun mi en la naturon. Ne en la laŭta tagmeza helo, kvankam ankaŭ la horo, kiam „la granda Pajno dormas“, estas plena de misteroj por tiu, kiu povas senti ilin, – – sed en la

malfrua vespero, kiam ĉiuj sonoj de la tago silentas, aŭ en la frua mateno antaŭ sunleviĝo.

En la vasta rondo vi sentos ion, kio metas vin en solenan etoson kaj feliĉigas vin *sen* pensado kaj raciaj kaŭzoj ...

Fordonu vin al tiu sentado kaj lasu ĝin enradikiĝi en vi!

Ripetu tion *ofte*, por ke vi *familiariĝu* kun via interna sentado!

Provu klare distingi ĝiajn diversajn nuancojn!

Ne estas indiferente, ĉu vi nur *reproduktas* tiujn sentojn en via ĉambro, aŭ ĉu vi sentas ilin, freŝe kaj ĉiufoje nove, *en la libera aero*. –

Via ĉambro, kia ajn ĝi estas, havas sian *propran* etoson, kaj kiom ajn klare vi kapablas enprofundiĝi en vian memoron, vi tamen *senvole falsigos* la etoson de vi intencitan.

En ĉambro vi havas *aliajn* eblojn por agordi vin kaj sonigi la plej kaŝajn kordojn de via animo.

Muziko kaj la aliaj belartoj, ne malpli ol la *poezio de la vorto*, povas *en viaj ĉambroj* alporti vin al vi mem.

Sed ĉu vi estas en la libera aero, sur monta altaĵo aŭ ĉe la bordo de kvietra rivero, ĉu vi lasas la senfinan vastecon de l' maro influi vin, aŭ legas kaj enprenas la vortojn de poeto ĉe la lumo de lampo, – ĉiam tio movita estos *via interno*, ĉar ĉio ekstera donas nur la *impulson* por vibrado, kaj ne portas en si mem tion, kion via animo *sentas per* ĝia perado.

La naturo restas morta kaj malvarma, kaj ĉiu verko de arto estas rigardebla sen sentado, se vi ne *mem* havas ĉe la animo tion, kion naturo kaj arto *peru* al vi kiel valoron por via konscio.

Nur en *vi* estas la sorĉa puto, el kiu vi povas plenigi viajn orajn vazojn. –

Tiel vi jam konsiderinde pli proksimiĝis al tiu nenomebla forto.

Iom post iom vi lernas, ke vi povas „*agordi*“ *vin mem*, kaj ĉio: *nutraĵo*, *vesto*, *restadejo*, *soleco* kaj *kompanio*, povas dum la fluo de la tempo fariĝi al vi „agordoforko“ ...

Depende de via „agordo“ vi sonigos en vi diferencajn „*sonojn*“, kaj vi baldaŭ ekkonos, *kiu* agordo konformas al via deziro pri anima klareco. –

Vi jam *uzadas* tiun nenomeblan forton, sed ankoraŭ temas pri ĝiaj *plej foraj* kaj *plej malhelaj* radioj, kiujn vi lernis uti-ligi por viaj celoj.

Sed ekzistas la eblo *paŝadi pluen*, supren, internen al *plena* anima klareco! – –

Kiu tie ĉi volas iri *antaŭen*, tiu devas fariĝi *artista pri sia propra vivo*. –

Kio pli frue ŝajnis al li „plenumiĝo“, tion li devas nun ri-gardi kiel *krudmaterialo*, el kiu li, kvazaŭ skulptisto, *kreas la artoverkon de sia anima strukturo!* – – –

Ne plu senelekte aŭ laŭkaprice li devas doni sin al tio, kion la vivo alportas al li.

Li devas lerni, mem formi la vivon, per tio, ke li scias „agordi“ sin *ĉiumomente* tiel, kiel konformas al lia fina celo.

Ĝis tie ĉi probable multaj povis akompani min, sed je tiu ĉi punkto la plej multaj malsukcesos, ĉar ŝajnas al ili *superhome malfacile*, tiumaniere primajstri la multajn diversajn okaza-ĵojn kaj necesajojn de la ĉiutaga vivo ...

Nur la malmultaj, kiuj fariĝis *maturaj* por tio, tie ĉi ne mal-sukcesos.

Nur ili fine malkovros en si sur tiu ĉi vojo la forton, kies regado estas *kondiĉo* por ĉiu, kiu volas ekpaŝi la padon al la plej alta lumo, padon, kiun altaj majstroj preparis por li.

En la tago, en kiu homo malkovras en si tiun forton kaj lernas uzi ĝin, komenciĝas por li *nova* vivo, kompare kun kiu ĉio, kion li *pli frue* nomis „vivo“, aperas al li kiel malhela matena krepusko kontraste al hela tagmeza somera suno.

Kaj tamen tiu ĉi tago trovas lin nur je la *komenco* de la vojo, kiu kondukas al la eterna lumo, tiu vojo, kiu estas *senfina*, ĉar ĝi ascendas de klareco al klareco, sur kiu ĉiu *ekkonado* ĉiam estas *superradiata* de nova, *pli profunda* kaj *pli pura* ekkono, kiu *siavice* cedas al pli alta ekkono, pli profunda spertado, pli klara vidado ...

Senfina estas tiu vojo, ĉar ĝia *celo* estas senlima kaj povas vidata en infinitobla maniero, – *senfina* ĝi estas, ĉar ĝia celo ampleksas senlimecojn kaj *neniam*, eĉ ne en miliardoj da „eternecoj“ povus esti plene elsondebla. – – –

Sed *neniam* trovos ĝin iu, kiu ne *antaŭe malkovras* tiun nenomeblan forton, tiun spiritan okulon, pri kiu la plejsaĝuloj de ĉiuj tempoj parolis en pli aŭ malpli travideblaj simboloj, tiu okulo, kiu ankoraŭ povas vidi eĉ tie, kie la lumo de nia tera suno malaperas en pli alta lumo, same kiel fajrero nevidebliĝas en maro da flamoj.

Neniam malkovros en si tiun okulon kaj lernos vidi per ĝi iu, kiu lasas sin blindigi per la artfajraĵoj de sia *intelekto*, – al kiu la intelekto (estanta en *sia* regiono fidinda ilo) fariĝas *mastro* kaj sekve la *plej terura* malamiko! –

Sciante tion el plej profunda memspertado, la alta majstro dankas al tiu, kiun li nomas „Patro“, tial, ke li malkaŝas sin al

„la malgranduloj kaj nesciantoj“, sed kaŝas sin for de tiuj, kiuj estas sklavoj de sia scio. – –

Ekkonante tion, li parolas la vorton pri la „infanoj“, al kiuj devas egali ĉiu, kiu volas sperti en si mem la „regnon de la ĉielo“. –

Pri li mem ili diris kun inerta koro: „Kiel ĉi tiu scias skribojn, neniam lerninte?“

Ili ne suspektis, ke li portis en si pli profundan fonton de saĝo, ol eĉ „la skriboj“ iam povis malkaŝi al siaj skribistoj, kiuj devis fari sklavoservojn al la intelekto, ĉar ili trovis en si nenion krom la intelekto, – nenion, kio povus doni al ili pli helan lumon kaj pli puran klarecon. – –

Fariĝos la plej granda tasko de venontaj generacioj, tasko ranganta super ĉio alia, utiligi por la surtera bono la spiritan fonton de saĝo profunde kaŝita en ĉiu unuopa tera homo, – tute aparte de tio, kiun efikon la trezoroj de ekkono ĉerpitaj el tiu ĉi fonto havas en la nepereonta vivo de la animo senigita je la tera korpo!

Sed nur tiam, kiam vekiĝos la kuraĝo forigi ĉiun rubaĵon, kiun la fierego de l' intelekto kutimis amasigi super tiu ĉi fonto dum jarmiloj, la homo de la tero ree trovos ĝin en la profundoj de sia sentado, profundoj hodiaŭ apenaŭ suspektataj.

*

*

*

Amo kaj malamo

„Amu viajn malamikojn, faru bonon al viaj malamantoj!“

Estas nedireble malfacile plenumi tiun ordonon, tiom longe, dum oni, kun malpura konscienco, devas sin *devigi* ami. –

Kiel homo kun bona edukiteco scias moviĝi *libere* kaj *nature* laŭ agrablaj manieroj, dum aliulo, al kiu bonaj manieroj ŝajnas „ĝena devigo“, moviĝas nur *plumpe* kaj *mallerte*, kiam li eniĝas en edukitan kompanion, – tiel same scios *ami* kun libera natureco nur homo, al kiu la arto de vivo, kiu estas *arto de amo*, *tiom alproprigi*s, ke ĝi primajstras karnon kaj sango.

Kie karno kaj sango ankoraŭ ne estas *primajstrita* per arto de vivo, tie la *amo*, kiu estas perforte estigata *por plenumi ordonon*, devas resti *mizera grimaco*, – devas fariĝi „*peko*“ kontraŭ la propra karno kaj sango, fariĝi „*mensogo*“, kiu ronĝas la medolon de vivo ...

Miloj kredas, ke ili havas „*devon*“ al tiu mensogo kaj ne suspektas, ke estus vere pli bone al ili, se ili ankoraŭ povus nutri en si malamon kaj malamikecon sen riproĉoj de sia konscienco. –

Ili volas ŝajni antaŭ si mem *pli bonaj* ol ili *estas*, kaj tiel ili mem baras al si la vojon, sur kiu ili iam fariĝus kapablaj, kun plena natureco kaj sen ia devigo, en *interna veremo*, agi tiel kiel postulas la ordono, kiun ili, pro timo de kulpo, obeas nevolonte.

Malklara ekkonado tie ĉi iras sur eraraj vojoj.

Dum tiuj irantaj sur tiuj ĉi vojoj volas lerni *ami* la amon, ili *malamas* la malamon!

Sed malamo estas formo nur de *senpotenca* forto – pli ekzakte: forto ne konscia pri sia potenco –, de la *sama* forto, kiu kiel *amo* trovas sian memliberigon.

Kiu ankoraŭ povas *malami* la malamon, tiu ankoraŭ ne ekonis la amon! Sed kiu neniam povis *malami*, tiu ankaŭ neniam lernos *ami*.

En mallumaj, pramondaj abismaj profundoj estas ankrita la forto, kiu en dia formo malkaŝas sin kiel *amon*, kaj tie formas ĝian kontraŭpoluson: la *malamon*.

Malamo kaj amo estas *samesencaj*, same kiel la radiko de tritiko-tigo havas la *saman* esencon kiel ties *spiko*, kiu donas al la homo fortoplenan nutraĵon.

Sed kiel troviĝas nodoj inter radiko kaj spiko, tiel same troviĝas *interstatoj* sur la vojo, kiu, ekde la natura, malalta urĝo al *malamo*, kondukas al la dioproksimeco de la *sama* forto, – al la *amo disvolvanta potencon ĉion ampleksantan*. –

Neniu el tiuj interstatoj devas esti „transsaltataj“, se oni vere volas lerni la arton de *amo*. – –

Ĉu vi eble ĝis nun atingis nur iun el tiuj *interŝtupoj*?

Ĉu vi eble ankoraŭ ne estas *kapabla* por vera *amo*? –

Ne afliktiĝu pro tio kaj ne provu perforte atingi ion!

Anstataŭe petu en vi mem pri la alta graco, ke la forto, kiu ankoraŭ ordonas al vi *malami*, baldaŭ malkaŝu sin al vi en sia plej lumanta dia formo – *kiel amo*!

Nur tiel vi povas iam *vere* sperti en vi la potencon de la amo, kaj tiam vi certe ne plu konos en vi la malamon, la *malaltan* formon de la sama forto, sed tiam vi ankaŭ ne plu povos *malami* la *malamon*. – –

Tiom longe, dum amo ankoraŭ bezonas ion por *malami*, eĉ se temas pri tio *plej malaprobinda*, tiom longe tio, kion vi nomas „amo“, estas nur misformaĵo el trompitaj strebado kaj sentado kaj havas absolute nenion komunan kun la dia amoforto.

En via venonta, *pli alta* spirita vivo, kiam vi komencis vian *ascendon* kaj post la morto de la tera animalo, kiu servis al vi, vivas en libera, *spirita* formo, vi havos *neniun eblon* malami, ĉar nenio eniras en la vivon de la pura spirito, nenio estas trovebla en la nemezureblaj regnoj de la eterna spirito, kio iam *povus* eksciti vian malamon.

Sed tie ĉi, dum vi ankoraŭ vivas sur la tero „*en la animalo*“, ekzistas multo, kiu volas forlogi vin al la malamo ...

Sed neniam via malamo povos *progresigi* vin sur la vojo al vi mem, sur la vojo returne al via prahejmlando, al la eterna vera vivo en la koro de la Dieco, kiel pura spirito kaj „filo de Dio“ en la pura spirito, en la „Patro de lumoj“, en kiu estas entenata la tuta abundo de beata vivo de eterne ĝis eterne.

Kiam vi nutras *malamon* en vi, eĉ se vi opinias, ke vi malamas nur tion „plej malamindan“, vi ĉiam trompos vin pri la disvolviĝo de via plej alta forto, *la forto de la amo*. –

Kvankam vi iam falis profunden el la alta lumado, tiel ke vi devis unuigi vin al la animalo de tiu ĉi tero, tamen ankaŭ ĉi tie penetras vin tiu dia forto, kaj dependas nur de *via* decido, ĉu vi volas uzi ĝin tiel, kiel ĝi restis en vi: en sia radiantanta *dia* formo, kiel *amo*, aŭ ĉu vi ŝanĝas ĝin en ĝian *kontraŭformon*, kiu ekzistas nur en la *malalta* „naturo“, en la vivo de la nemezurebla *fizika* universo, – kaj en ĝiaj *nevideblaj* estaĵoj kaj en la *homo*, kiu tie ĉi surtere videbliĝas al vi per sia animaleca formo. –

Certe, ekzistas en tiu ĉi kosmo *nevideblaj inteligentaj estaĵoj*, kiuj sin donas nur al la *malamo*, sed ankaŭ ilin *vi ne malamam*, kiom ajn forte ili persekutas vin per sia malamo.

Vi povas renkonti ilin kiel venkanto nur, se vi sendas renkonte al ili *amon*, kiu *senfortigas* eĉ ilian plej furiozan malamamon, tiel ke ili *devas* forturniĝi de vi, ĉar ili *suferus* de via amo ...

Vi povas malestimigi tion malestimindan, tio estas: laŭ ĝia manko de valoro *forpreni de ĝi vian estimon*, sed vi ne opiniu, ke vi devas *malami* ĝin! –

Tuj kiam vi komencas malami, vi interligas vin kun ĉiuj estaĵoj en tiu ĉi fizika universo, kiuj laŭ sia naturo konas tiun eternan praforton *nur en la formo de la malamo* kaj *neniam* povos ŝanĝi ĝin en *amon*.

Vi plifortigas la fluojn de malamo, kiuj estas kondukataj de ili en *homajn korojn*, kaj tiel faras vin kulpa pri ĉio pereiga, kio ĉe la homoj de tiu ĉi tero estiĝas *el malamo*, – vi strebas al la profundo de l' abismo, al la perejo, anstataŭ ke vi leviĝas al via ascendo ...

La potencaj, nevideblaj inteligentuloj de la fizika kosmonaturo, kiuj havas nur *tempe limigitan* vivon, kvankam ĝi daŭras jarmilojn, ĉiam batalas por posedi vin, ĉar ili *neniam* povas ekkoni la „mondon“ de la *spirito* kaj rigardas vin nur kiel sian *subulon*. –

Ne ĉiuj donas sin *samagrade* al la malamo, kaj kelkaj eĉ „bonafide“ kredas, ke ili *gardas vin kontraŭ eraro*, se ili provas *deteni* vin de via ascendo al la pura spirito kaj *ligi* vin en *sia* sfero de potenco. –

Vi devas scii, ke vi estas *senlime pli potenca* ol ili per la forto de la *amo*, kiun eĉ la *plej bonaj* el ili *ne konas*, eĉ se ili *ne fordonis* sin al la malamo!

Vi devas scii, ke, *laŭ via tera intelekto*, vi certe staras profunde sube de la plej multaj el tiuj potenculoj, kaj ke *via pensado* estas altagrade *subigita* al ilia deviga influo, sed ke vi *tamen* povas, per tiu *spirita esto* imanenta en vi, fariĝi kapbla por speco de ekkonado, kiu al ĉiuj el ili restas *fermita* por ĉiam, ĉar ili neniam *povas* atingi la *spiriton*, tial ke *ili mem ne estas* „spirito“ kaj sekve la *esto de l' spirito* ne povas sin malkaŝi al ilia scio, kiom ajn alta ĝi estas, same kiel vi neniam povas malkaŝi al iu animalo de tiu ĉi tero la abundon de viaj pensoj kaj sentoj. – –

Ne lasu vin trompi kaj ne rigardu *supren* al ĉio, kio staras super vi!

Ekzistas nur unu afero, kiu estas *inda* je via sopira rigardo supren, kaj tiu estas *super* la tuta fizika kosmonaturo kun ties armeoj da potencaj, sed al ni nevideblaj fortoregantoj kaj alte inteligentaj estaĵoj!

Via supren rigardanta sopiro apartenu *sole* al via prahejmlando en la regno de l' *pura spirito*, kaj vi povas atingi ĝin nur, se vi vivas en *amo*!

Sur Golgota, tiu granda amanto liberigis la *amon* de la katenoj.

Ĉu vi apartenas al liaj kredantoj (al tiuj, kiuj nun mem nomas sin „kristanoj“ laŭ tiu, kiu estis „*Christos*“, t.e. „sanktoleito“ de plej altaj konsekroj), aŭ ne: – la forto malligita de li doniĝas al vi *nur tiam*, se vi *mem* donas al la *amo* en via vivo vastan spacon por efikado!

Sen amo, liberigo neniam povas doniĝi al vi! –

Antaŭ eonoj, *amo* de la plej interna *amo-suno* vokis vin en ekziston el si mem, kaj nur amo kondukas vin returne en vian *prahejmlandon*.

Kreskado de la animo

Ne vane oni parolas pri „*kreskado*“ de la animo, ĉar „la animo“ estas, kiel mi jam sufiĉe klarigis en aliaj lokoj, *organismo* perceptebla nur al la plej altaj *internaj* sensoj, formita el *nenombreblaj unuaĵoj*: la „*animoelementoj*“, aŭ la ĝuste komprenataj „*skandhaoj*“ de la Hinda terminologio. –

En kadavro sur la dissekcia tablo neniu anatomo povas trovi la animon, sed ja *en si mem*, se li ne lasis sian memsentadon malfortiĝi!

La animo estas kapabla *kreski*, same kiel ĝi estas kapabla *malkreski*; ĝi eĉ povas – ankaŭ dum la korpa vivo – *preskaŭ plene malaperi*, sen tio, ke la funkciado de la korpaj organoj estas *malebligata*.

La kreskado de la animo ankaŭ povas *halti*, kaj povas okazi certa steriliĝo, kiu ekskluzivas ĉiun pluan kreskadon.

Ne vane, pia kredo vokas al la homo: „Savu vian animon!“–

Aŭ: „Kiel profitus homo, se li gajnus la tutan mondon kaj suferus damaĝon je sia animo?“

Jes, oni vere *povas* „suferi damaĝon“ je sia animo, kaj *tre multaj* suferas damaĝon je la animo, sen nur iomete atention; ili ofte eĉ opinias, ke ili estas meze de anima kreskado, kaj ne suspektas, ke tio, kion ili rigardas kiel sian „animon“, estas nenio alia ol la *pli fajna, nevidebla organismo de ilia fizika korpo*, organismo, kiu certe *povas* efiki benoplene, se ĝi estas *gvidata* de la fortoj de l' animo, se ĝi *servas* al la ani-

mo, sed kiu ankaŭ povas nedireble *malhelpi* la agadon de la animo, se ĝi *aŭtokrate* havigas al si potencon en homo.

Ĉiu, kiu penas redirekti la strebadon kutime nomatan „religia“, vidante sian „religion“ ekzemple en la *arto*, en *estetika sentado*, en *strebadado al sciencaj ekkonoj*, aŭ en *ĝojo pri la „naturo“*, fariĝis sklavo de tiu pli fajna fizika organismo kaj estas en plej granda danĝero fariĝi mortiganto de sia animo. –

Kvankam parto de liaj animoelementoj plue aktivas en li, li tamen ne kapablas kunigi ilin en *individuan* animon, kaj kiam, kun la perdo de la fizika korpo, perdiĝis al li ankaŭ ties pli fajnaj fortoj, li devos pasigi tempojn, kiuj laŭ tera tempokalkulo estas *jarmiloj*, en malklara, turmentoplena duonkonscio, ĝis ebligās al liaj altaj helpantoj „vekĉi“ lian animon, por ke li, „vekiĝinte“, komencu vere vivi, tie, kie *kapablas* vivi en plena klareco de la konscio *nur* tiu, kies *animoelementoj* unuiĝis en li, formante *individuan animon*. – –

Tial estas dirite: „*Laboru*, dum estas tago, ĉar venas la *nokto*, kiam neniu *povas* labori.“ –

Sed ĝi venas nur *por tiu*, kiu ne sciis *plimultigi* tie ĉi la animoelementojn al li konfiditajn.

Kiu ajn *havas*, al tiu estos *donate*, por ke li havos *abundon*; sed kiu ajn *ne havas*, for de tiu estos *prenata* eĉ tio, kion li eble *laŭ sia opinio* havas, kiom ajn malmulta ĝi estas! –

Kiu, same kiel „la fidela servisto“, scias *plimultigi* tion ricevitan de sia sinjoro, por tiu aplikiĝas la vorto: „Ĉar vi estis fidela pri malmultaj aferoj, mi starigos vin super multaj.“

Sed kiu *enfosas* sian talanton kaj alportas nur tion, kio komence estis donita al li, tiu devos laŭ la eternaj leĝoj sperti „la eksteran mallumon“: la regionon senigitan je ĉiu anima

varmo, en kiu estas „plorado kaj grincado de dentoj“ pro internaj malvarmo kaj malhelo.

La tie ĉi cititaj vortoj de la evangelioj estas nenio alia ol bildece formitaj, vivaj prezentoj de la efikado de eternaj leĝoj.

Ion korpa ni povas percepti eĉ sen la animo, kvankam la korpa perceptado gvidata de la animo rezultigas esence aliajn impresojn en la konscio, ol povas peri la pli fajnaj fizikaj fortoj.

La kredo de l' popolo, laŭ kiu ne ekzistas korpa vivo sen „animo“, erare komprenas sub la vorto „animo“ nur tiujn pli fajnajn, fluidecajn, fizikajn fortojn, eĉ se oni samtempe atribuas al tiuj fortoj ecojn, kiuj apartenas nur al la vera animo.

Se korpo, fariĝinte *senanima*, estus ankaŭ „*senviva*“, tiam ne tiom multaj *senanimaj* homoj forprenus de tiu surtera ekzisto ĝian varmon, kaj la avertoj de la evangelioj estus necesaj!

Sed dum la *korpo eĉ sen animo* fakte havas sian *konscion*, kaj dum ankaŭ *senanima* homo sentas sin kiel korpa „mi“ – ekzemple en la senco celita de *STIRNER** –, estas *tute neeble* por ni percepti *sen animo* la regnon de la pura *spirito*, la *realajn spiritajn mondojn*. –

Tiu „mi“, kiu sole kapablas percepti *ankaŭ tie*, estas *mem animoelemento*, kiu estas travivata kaj tralumata de fajrero da *eterna spirita lumo* por eterne, tuj kiam ĝi vekigante ekkonis en si la kapablon fariĝi la eterne lumanta „korpo“ por tiu

* Max Stirner (pseŭdonimo de Johann Caspar Schmidt), germana filozofo (1806 – 1856) (Rim. de la tradukinto)

eterna spirita fajrero, – aliavorte, tuj kiam la „vivanta Dio“ povis naski sin en tiu „mi“.

Ĉirkaŭ tiu „mi“ ĉiuj aliaj animoelementoj devas kristaliĝi, – kun ĝi ĉiuj animoelementoj devas esti *unuigataj*, se la homo estu kapabla eniri plenkonscie en la eternan regnon de la esenca spirito!

Kion oni, en ordinara lingvouzo, nomas „spirito“, tio estas *intelekto* aŭ *prudenteco*, *inteligenteco* kaj *ekstera scio*. –

Temas pri la eksterigo de la *pli fajnaj fizikaj fortoj*, kiuj estas kaŝitaj en la tera korpo.

Tiu „spirito“ de la ĉiutaga lingvouzo havas *absolute neniun komunan* kun la „esenca“, *substanca regiono de la eterna spirito*, pri kiu mi tie ĉi parolas, same malmulte kiel tio, kion oni nomas la „animo“ de la *animaloj*, havas ian rilaton al la *eterna, flueganta maro de la animoelementoj*, pri kio tie ĉi temas, kiam mi parolas pri la *kreskado de la animo*. – –

Ekzistas multaj laŭsupoze „animaj“ sentoj de la „homa animalo“, en kiuj ĝi estas eĉ *multe superata* de kelkaj aliaj specioj de animaloj, sed tiu ĉi „animo“ *de animalo*, kiun nature posedas ankaŭ la fizika homo, kapabligas nek homon nek animalon sperti la *spiritan* regnon, same kiel alte disvolviĝinta *intelekto* havas neniun utilon por atingi la konscion *en la esenca lumo de la spirito*.

Oni lasas tro facile trompi sin per tio, ke dum nia surtera vivo la *cerbo* fariĝas transformilo por *ĉiuj* specoj de konscio, tiel ke *ne nur* la eksterigoj de la *pli fajnaj fizikaj fortoj de la korpo*, indiferente ĉu ili estas erare rigardataj kiel „spiritaj“ aŭ kiel „animaj“ eksterigoj, *sed ankaŭ* la *vera spertado de la eterna regno de la animo* kaj la *spertado de la esenca spirito*

ĉiam estas registrataj *en la cerbo*, tiom longe, dum ekzistas vivanta, sana cerbo.

Sed se tie ĉi la *sama* instrumento registras tre *diferencajn* moviĝojn, oni ĝuste tial ne devas neglekti ĉiun *distingadon*; kontraŭe oni devas lerni kvazaŭ „legi“ en si mem, *kiu* el tiuj specoj de moviĝo iuokaze tuŝas la cerban aparaton.

Se oni volas zorgi pri la *kreskado de la animo*, oni devas vole aŭ nevole atribui plej grandan gravecon al la zorgado pri *tiu* direktiĝo de la cerbo, al kiu neniu vere anima moviĝo, neniu tuŝo fare de la fortoj de l' animo restas neremarkita.

Estas tute ne necese, kaj krome estus preskaŭ neeble, tiucele *malakrigi* la sentivecon de la cerbo por *alispecaj* moviĝoj, ĉar dum ni vivas ĉi tie kiel teraj homoj, ankaŭ la moviĝoj de la pli fajnaj fizikaj fortoj de la *korpo*, same kiel ĝiaj pli *kru-daj* fortoj, estas gravaj por ni kaj *nepre ne restu nerimarkitaj* de la atentemo de l' cerbo.

Sed: „*Celu unue* la regnon de Dio kaj“ tion, kion ĝi postulas: „*ĝian* justecon“, kiel sekvon de la ĝusta plenumado de eternaj leĝoj, „kaj *ĉio cetera* estos aldonita al vi.“

Estas signo de zorgiga *malforteco*, se oni kredas, ke oni povas plene konformi al la vivo de la animo nur tiam, se oni *fuĝas* for de „la malbona mondo kaj ties kvereloj“, por ne esti ĝenata de io alia!

Korpaj fortoj pligrandiĝas nur per konstanta *uzado* kaj per konstanta *ekzercado kontraŭ rezistoj*, kaj en tiu ĉi punkto *tute la samo aplikiĝas* al la fortoj de la animo!

Kiu ne scias servi al la kreskado de sia animo meze de la ĉiutaga vivo, sen apartiĝo kaj sen montri la konduton de mondo-neanto, tiu certe ne atingos kreskadon de la animo, eĉ se li fariĝus kunulo de tigroj kaj serpentoj en hindaj ĝanga-

loj, aŭ lasis sin enmasoni en tibeta monaĥejo por la resto de sia surtera vivo! –

Se estus permesate al mi de la vivoprafundo de mia eterna spirita konscio, mi povus plenigi tutajn volumojn per raportoj pri miaj spertoj en transmondaj regionoj, rilate al la stato de tiaj pentofarantoj kaj arbaraj ermitoj, post kiam ili forlasis sian teran korpon.

Sed estas permesate al mi diri tion ĉi: – ke *neniu* el tiuj malfeliĉuloj post sia transiro tuj *atingas* la celon, kion li *opiniis* jam surtere atingita, post kiam la eksterigoj de liaj *pli fajnaj fluidecaj korpofortoj* sukcesis *trompi* lin pri tio.

Oni devas servi al la kreskado de sia animo meze de la mondovivo, kie ajn oni estas starigita!

Apartigo povas *portempe* esti utila, kiam oni komencas senti, ke la memdirektiĝo al la sentado de veraj animo-elementoj minacas perdiĝi, sed la apartigo daŭru nur plej *mallongan* tempon kaj servu nur al tio, ke oni *retrovu la memdirektiĝon*. Tuj kiam oni retrovis ĝin, oni revenu al sia kutima vivo!

Ekzistas nur tre malmultaj homoj sur la tero, kiujn *daŭra* apartigo ne damaĝas, kaj tiuj malmultaj, malgraŭ ilia apartigo, tamen vivas *en kunestado kun homoj similaj al ili*, kaj ne vivus izolite, se ili ne devus plenumi aferojn, por kies plenumado devas esti kreata stato, kiu ne povas esti konservata en la agada moviĝado de la mondovivo.

Ili estas en soleco nur tial, ke ili agas en „templo“, kiu devas esti malproksima de ĉiuj bruoj de la mondo, kaj ili restas en tiu foreco nur tiom longe, dum ilia *agado* tion postulas, sed tute ne serĉas tiun solecon kiel „fuĝintoj el la vivo“. –

La kreskado de la animo ankaŭ ne estas progresigata per *profundaj studoj*, per *filozofiaj ekkonoj*, aŭ per la *serĉado de nekonataj fortoj* de la naturo!

Oni povas faradi ĉion ĉi kaj tamen jam antaŭ longe esti *perdinta* sian animon!

Ekzemple terkultura servisto aŭ ŝarĝoportisto povas atingi la plej altan kreskadon de la animo tute same kiel la plej erudita scienculo, – sed povas atingi ĝin *neniu*, *kiu evitas la devojn apartenantajn al lia socia pozicio*, erare opiniante, ke oni povas servi al la kreskado de sia animo *pli bone*, se oni forlasas la mondon aŭ siajn profesion kaj socian pozicion! –

„Kiu penas gajni sian animon, tiu ĝin perdos; sed kiu ĝin perdos, tiu savos ĝin viva.“

Tiu ĉi malluma vorto signifas interalie, ke „forlasi la mondon“ por trovi la animon *neniam povas konduki al la celo*, ke kontraŭe la kreskado de la animo estas trovebla nur *tie*, kie oni plej malmulte esperas trovi ĝin: – *meze de la aktiva vivo en la mondo*. –

Nur per *praktika agado en la ĉiutaga vivo* ni povas kreskigi nian animon! – Ekzistas *neniu* eblo servi *sole* al la animo kaj samtempe ignori la ĉiutagan vivon!

Temas nur pri malkuraĝo kaj inerteco aŭ pri erara filozofio, se oni reve imagas al si vivon, kiu, dediĉita ekskluzive al la kreskado de la animo kaj deturnita de la mondo, estu kapabla atingi *tion*, kio estas atingebla por la homo de la tero nur *en konstanta luktado kun la fortoj de la mondo*. –

Oni certe povas progresigi la *mortemajn*, *pli fajnajn*, *fluidcajn fortojn de la korpo*, se oni fuĝas el la monda vivo, sed *neniam* iu homo *kreskigos sian animon*, se li ne *ĉiutage denove provas* ĝiajn fortojn je la *rezistoj*, kiujn preparas al li la

„ekstera mondo“, la agada moviĝado de la multaj, kiuj ĉirkaŭas lin! –

Ankaŭ la „granda amanto“ dum sia tera vivo ofte iris „sur la monton“ aŭ en dezertan lokon, por „preĝi“.

Li instruis: „Kiam vi volas preĝi, eniru en vian ĉambreton kaj ŝlosu vian pordon.“

Sed *neniam* li instruis fuĝi el la ĉiutaga vivo, *neniam* li *mem* malkuraĝe evitis la viglan vivon de sia tempo kaj sia popolo.

Li manĝis kaj trinkis, kion aliaj manĝis kaj trinkis, kaj festis kun ili iliajn festojn.

Ĉe „pekuloj kaj impostistoj“ li estis gasto, same kiel ĉe tiuj, kiuj opiniis sin la plej piaj. – Kun skribistoj li sidis ĉe manĝo, kiel en la domo de la estinta hetajro. –

Ĉie kaj ĉiuloke „la regno de la ĉielo“ estas „proksima“ al li, ĉar ĝi estas *en* li...

Li *vivas* la instruon, kiun li sciigas al siaj disĉiploj, – *montras* al ili, kiel la kreskado de la animo bezonas *vivon* kaj *agadon*.

*

*

*

Spirita gvidado

Estas nenombreblaj tiuj, kiuj en tiu ĉi tempo sopiras *spiritan gvidadon*, kaj nenombreblaj ankaŭ tiuj, kiuj *kredas*, ke ili vivas sub „spirita gvidado“, dum ili estas vere nur sub influoj originantaj en la vasta regiono de „mediumismaj“ manifestiĝoj.

Estas necese ree lerni „distingi spiritojn“.

Ne ĉiu voĉo, kiu fariĝas perceptebla en ies interno, estas la voĉo de spirita gvidanto, la voĉo de dia kondukado!

Multe pli ol suspektas la plej multaj homoj, estas disvastiĝita hodiaŭ speco de mediumismaj manifestiĝoj, kiu multe faciligas al la lemurecaj loĝantoj de la nevidebla parto de la fizika mondo, havigi sukceson al sia dezirego esti agnoskata en la konscio de l' homo per tio, ke ili misuzas en siaj viktimoj la kapablon skribi, jen *malaktivigante* la cerban memregadon, jen uzurpe *uzante* la cerbofunkcion.

Propradire, ĉiu homo povas fariĝi spiritisma „mediumo“, kvankam la gradoj de mediumeco povas esti treege diferencaj.

Sed estas tute indeferente, ĉu oni *konscie volas* „disvolvi“ sin kiel spiritisman mediumon, aŭ ĉu oni opinias, ke oni estas *malproksima* de ĉiuj fenomenoj atribueblaj al tio nomata „spiritismo“.

Ĉiu homo, kiu fidus „internan voĉon“, kiu postulas de li *pasivecon*, – kiu do volas igi lin *obei* ĝiajn parolojn, kiu volas, ke li rigardu ilin kiel *konsilon*, eĉ kiel internan *ordonon*, – elmetas sin al la danĝero fariĝi servutulo de tiuj lemuraj

estaĵoj kaj spiritisma „mediumo“, kaj li jam *estas* tia, se lia mano komencas skribi „aŭtomate“, indifere, kion tio skribita enhavas. Tiuj estaĵoj de la intermondoj, kiuj mokas liajn provojn regi ilin, penas montri sin al li laŭ la speco de lia mondobildo.

La pia kredanto pensos, ke li ricevas gvidadon de „anĝeloj“ kaj „sanktuloj“, eĉ de „Kristo“ kaj „Dio-Patro“, la ano de la nova „teozofio“ sentos sin sub la gvidado de altaj „mahatmoj“, kaj aliaj estas forlogataj al la kredo, ke ilia propra „pli alta mio“, ilia eterna spirita estaĵo elfluanta el la prafonto de Dio tiumaniere malkaŝas sin al ili.

(Kiel karakterizan kuriozaĵon mi tie ĉi deziras mencii la fakton, ke mi estis sciigata de la koncernaj personoj mem pri ne malmultaj okazoj, en kiuj la lemuraj estaĵoj opiniis bone, kredi al siaj viktimoj, ke ilia „spirita gvidanto“ estas „Bô Yin Râ“. – – Kiel oni vidas, oni povas akiri reputacion, pri kiu oni vere suspektas nenion!

En *unu* el tiuj okazoj, la koncernaj personoj neniam antaŭe estis aŭdinta mian nomon, – estis atentigataj de iliaj laŭsupozaj „spiritaĵ“ gvidantoj pri miaj libroj, – unue timis demandi la libriston pri ili, kaj tiam, aŭdinte, ke aŭtoro kun tiu nomo reale ekzistas, ili kompreneble rokfirme konvinkigis, ke ili estas sub mia gvidado...

La komentarioj, laŭdire komunikitaj de mi mem al la spirita gvidanto de la mediumo kaj poste prezentitaj al mi, eĉ ne estis malbonaj, kvankam ili konformis tute al la imagonivelo de la personoj aŭtomate skribintaj.

En alia okazo oni eĉ sendis al mi plej maldecajn leterojn, kiam mi provis korekti la eraron estiĝintan en spiritisma maniero, kaj oni tute serioze faris la ridinde strangan aserton, ke mi tute ne estas „*la vera*“ Bô Yin Râ: „la adorinda majstro“,

kiun oni mem konas kiel „*gvidanton*“ kaj *kiu skribis miajn librojn*. – Tie ĉi mi koncedas, ke certa parto de tiu frazo *tute* konformas al la vero.

Homoj alie disponantaj tre bonan juĝkapablon estas instigeblaj al tiaj malsaĝaĵoj per la influo de siaj „spirits“.)

Bonfidaj „spiritistoj“ iam elpensis la belegan instruon, ke inter iliaj „spiritoj“ supozeble ekzistas tre trompaj, sed ankaŭ petolemaj kaj burleskaj estuloj, kaj ke tamen troviĝas ankaŭ iuj plenaj de boneco, amo kaj sublimeco.

En plena naiveco oni rigardas kiel distingilon la „revelaciojn“ de la „spiritoj“ mem, kaj se tiaj komunikoj *avertis kontraŭ malbono* aŭ *rekomendis bonon*, tiam la ortodoksaj animoj opinias nedubeble pruvita, ke ili interrilatis kun „bonaj“ spiritoj.

Mi dezirus, ke ĉio estu tiom simpla, kiom kelkaj cerboj imagas! –

Eble la „scienco“, malestimata en tiaj konventetoj, tiuokaze estus ne sufiĉe malsaĝa por rifuzi la spiritisman hipotezon, kaj estus jam antaŭ longe kaj senhezite konvertiĝinta al la spiritismaj komunumoj! –

Anstataŭe, eĉ la esploristo CROOKES, fininte siajn sukcesajn eksperimentojn, faras la deklaron, ke li ja estas konvinkita, ke li ofte eksperimentis *kun nevideblaj estaĵoj*, sed ke li *tute ne* povas akcepti la spiritisman hipotezon, ke temas pri mortintoj aŭ ties pluvivantaj animoj. – –

Estas iom strange, ke tamen ĉiu vera spiritisto eĉ hodiaŭ rigardas la esploriston *Crookes* kiel elstaran garantianton!

Oni ja ĝoje lasus netuŝita la sanktaĵon de la fanatikigitaj kredantoj en spiritismaj rondoj, se ne *fluego da malfeliĉo* el-

irus de ĝi, pri kiu *psikiatroj* kaj *kriminalistoj* povas raporti surbaze de sia tre malĝojiga sperto.

Tial oni ne povas emfazi sufiĉe ofte, ke en *aŭtentikaj* spiritemaj manifestiĝoj *nenio alia* havas forton de pruvo *ol la fakto de la manifestiĝoj mem*, kaj ĝi pravas nur, *ke* – kion ankaŭ CROOKES prave rigardis kiel pruvitan – *nevideblaj estaĵoj kapablas, per la uzo de homaj organoj, rezultigi certajn efikojn, kiuj povas impresi la konscion de tera homo.*

Sed nur tio estas „pruvita“!

Pri la *natur*o de tiuj nevideblaj estaĵoj la eksperimento *ne* povas doni klarecon, kaj estas vere infanece malsaĝa la supozo, ke la *eksterigoj* de tiuj estaĵoj ricevitaĵ pere de mediumo aŭ iliaj *indikoj pri si mem* sufiĉas por doni fidindan informon pri ilia *natur*o. –

Mi ja ankaŭ ne senhezite kredas al homo, kiu kontaktas min telefone kaj asertas, ke li estas „la imperiestro de Ĉinio“.

Sed eĉ por tiu, kiu konas la kaŭzojn de eraroj kaj la eblojn de trompado en „spiritismaj“ manifestiĝoj, ekzistas preskaŭ *nenia* sekurigo kontraŭ la risko esti trompata de la komunikanto en plej impertinenta maniero.

Vere, la „distingado de spiritoj“, pri kiu Paŭlo parolas, ke ĝi estas dono de la spirito de Dio, estas *io alia* ol tiuspeca trokredema modesteco! – –

La nevideblaj, lemurecaj estaĵoj de la nevidebla parto de la fizika mondo donos al vi la plej *altajn* instruojn same kiel la plej *trivialajn* eldirojn, eĉ la plej *vulgarajn obscenaĵojn*, depende de tio, kio pleje plaĉas al la nevideblaj, neregeblaj komunikantoj.

Elprovu nur unufoje viajn altajn „spiritajn gvidantojn“, de kiuj vi ĝis nun aŭdis nur la plej patosajn parolojn; diru al ili, ke ili estas *trompistoj*, kiam ili ŝajnigas esti mortintaj homoj aŭ spiritaj instruantoj, kaj ke vi *volas plu neniam interrilati kun ili*, – kaj vi terurite vidos, al *kiaj* „amikoj el la mondo de spiritoj“ vi konfidis vin! –

Ne mankas iamaj „spiritistoj“, kiuj ankoraŭ estis sanigataj rezulte de tre drastaj spertoj, kaj ili ĉiuj povas konfirmi, kion mi tie ĉi diras.

Tamen mi *komprenas*, se vi subfalas al la trompo!

Vi ricevos eldirojn, kiuj igas facile komprenebla vian kredon, ke vi interrilatas kun „karaj mortintoj“, ĉar estas malkaŝita al tiuj estaĵoj multo, kio estas al vi dense vualita, kaj per sia ruzeco ili facile povas eltrovi tion, kio plej bone povus konvinki vin. –

Nenio estas „sankta“ al ili; ili konas nek „bonon“ nek „malbonon“!

Ili estas plenaj nur de la urĝo esti *agnoskataj de vi kiel reale ekzistantaj estaĵoj* kaj forte imponi al vi, indifere, ĉu ili atingas tion per sublimaj paroloj, per vulgaraj insultoj, per profetaĵoj kaj bonaj konsiloj, aŭ per petolado kaj stultaĵoj.

Se vi kredas, ke vi tiumaniere povas ekinterrilati kun viaj mortintoj, – ankaŭ en dubo povas esti kaŝita la *deziro povi kredi tion*, – tiam vi ankaŭ *tiurilate* estos bonege priservataj; sed tie ĉi ekzistas ankaŭ la ebleco, ke la vin trompantaj estaĵoj de la nevidebla parto de la fizika mondo fariĝas *perantoj* de „mesaĝoj“ originantaj el la *imagokapablo* de mortintoj, kies ascendo de sur malalta ŝtupo de spirita disvolviĝo ankoraŭ ne komenciĝis.

Sed *neniam* vi tiumaniere ekinterrilatos *kun la mortintoj mem*, indifere, sur kiu ŝtupo de spirita disvolviĝo ili staras.

Neniam! – –

Tiom longe, dum la tero portas homojn, nevideblaj estaĵoj de la fizika mondo ankaŭ provis prezenti sin kiel „spiritajn gvidantojn“, kie ajn homoj sopiris tian gvidadon.

Eĉ *multe pli altajn* ambiciojn la teraj homoj plenumis al ili, kaj pli ol unu „miraklojn“ faranta „dio“ de antikva kaj, en certaj kulturoj, ankaŭ moderna tempo apartenas al ilia rondo, en kiu ekzistas multaj *specifaj diferencoj*, ekde animaleca instinkto ĝis inteligenteco multe superanta homan mezuron. –

Ofte estas facile kompreneble, ke neinformita homo sin donas fidante kaj respektplene al la *hipnota influo* de tiuj estaĵoj, – kaj esence temas pri nenio alia.

Li ne atentis, aŭ opinias tute natura, ke lia ŝajne tiom alta „spiritita“ gvidanto pli kaj pli alproprigas al si lian *volon*, – ke la gvidanto per laŭgrada pliintensigo penas *uzurpi* tiun volon.

Eble unue estas donataj ofte surprize *ĝustaj konsiloj*, aparte tiaj, kiaj rilatas la *eksteran* vivon, aŭ *antaŭdiroj*, kies ekzakta realiĝo kaŭzas eĉ multe pli da mirego.

Se poste la fido de la viktimo estas sufiĉe firmigita, tiam ne malofte sekvas „*komisioj*“.

Oni kredigas al li, ke li havas „specialan mision“, aŭ ke li devas plenumi ion specifan, kaj la plej strangaj malsaĝaĵoj jam estis farataj sekve de tiuj laŭsupoze „spiritaj“ taskoj.

Sed en aliaj okazoj, kie tro impeta agmaniero povus rezultigi, ke la jam ruze ĉirkaŭligita viktimo ankoraŭ eskapus el la influo de la nevideblaj parasitoj, oni kontentigas sin ludi nur la rolon de la alta „spiritita gvidanto“ kaj prudente ne faras ion, kio povus vekti la suspekton de la trompito.

La nespertulo ne scias, kiom instinkte *sagace* procedas liaj laŭsupozaj „spiritaj amikoj“. – Li ne scias, ke ili konas liajn plej sekretajn inklinojn kaj dezirojn vere pli bone ol li mem, kaj ke ili ekspluatas ĉion, kio povas igi lin propravole transdoni sin kiel predon. – –

Sed tiu ĉi *propravoleco* estas necesa, se homo subfalu al la estaĵoj de la nevidebla fizika mondo, kaj tiu konstato mem implicas, kiumaniere tia dependeco povas kun plena certeco esti *evitata*. –

Kiu serĉas veran *spiritan* gvidadon, tiu antaŭ ĉio fariĝu *certa pri si mem* kaj sciu, ke vera „gvidanto“ *el la mondo de la spirito* neniam proksimiĝas al li, dum li kontentiĝas je pseŭdo-gvidado, kiun mi tie ĉi devis priskribi detale.

Vere *spirite* „gvidi“ *povas* nur unu el la rondo de la *luman-toj de la Pralumo* sur tiu ĉi tero, kaj inter ili *nur tiu*, al kiu en individua okazo la gvidado estas konfidita, pro tio, ke liaj animaj vibroj konformas al tiuj de la serĉanto, pro tio, ke ilia sentada ritmo moviĝas en paralelaj vojoj. – –

Sed *neniam tia* „gvidanto“ celos iumaniere kaŝe subordigi la *volon* de la serĉanto al la sia, neniam li celos iumaniere malaktivigi ties volon.

Ĉiam li lasos la *serĉanton* mem decidi, ĉu li volas sekvi la kvietan inspiron donitan al li, aŭ ne.

Lia spirita kaj preskaŭ nerimarkebla „gvidado“ ĉiam konsistas en tio, ke li *lasas* la serĉanton *partopreni* en la propra ekkono, kaj neniam en altrudita konsilo, kvankam tiu gvidado nerekte estas plena de bonaj konsiloj. –

En *neniu okazo* li „sugestos“ en la serĉanto iun agmanieron.

Neniam *tia* gvidado konfidos al la serĉanto iun laŭsupozan „mision“, neniam ĝi ordonos al li fari iun grandan faron en la ekstera mondo, neniam ĝi provos iumaniere influi lian eksteran vivon ...

Ĝi ankaŭ neniam penos akiri al si kredindecon per „antaŭdiroj“ aŭ io simila, ne sciigos iun „nomon“ kaj ne donos iujn konsilojn rilate al teraj okazaĵoj.

Tia gvidado ĉiam estos por la serĉanto nur *partoprenado en la interna vivo de homo perfektiginta en Dio*, ekzakte konforme al la grado de sentemeco de la serĉanto.

La „gvidanto“ ĉeestos per sia kvazaŭ „pasiva“ inspiro, kiam la serĉanto „vokas“ lin per sia agmaniero, kaj la serĉanto neniel rimarkos la ekziston de la gvidanto, tuj kiam li opinias, ke li ne bezonas ties gvidadon.

Same kiel amiko plej interne ligita kaj *unuiĝinta* kun li, li gvidos la serĉanton, malkaŝante sin mem al li sole nur per *sia propra interna spirita vivo*, kiel „modelon“ por la serĉanto, kiel enradiadon de spirita esto, kiu efikas sole per *sia ekzisto*, sen bezoni la procedon de demandado kaj respondado. – –

Kiu serĉas tiun vere *spiritan* gvidadon, tiu restu malproksima de ĉiu scivolemo rilate la eksteran, personan ekziston de sia gvidanto!

La serĉanto evitu ĉiujn „*demandojn*“, kiuj rilatas al siaj propraj eksteraj, teraj vivcirkonstancoj aŭ al tiuj de sia spirita gvidanto, aŭ al aliaj okazaĵoj en la ekstera mondo!

Eĉ rilate *pure spiritajn* aferojn li neniam faru „*demandojn*“, sed li trankvile atendu, en interna koncentriĝo, ĝis li ricevas, per enrigardo en la plej profundan ekkonadon de sia

spirita gvidanto, *klarigon* pri la aferoj, kiuj ankoraŭ ŝajnis al li neklaraj.

Vera *spirita* gvidanto scias *sen* ia demando, kio en la serĉanto postulas klarecon, sed estas ankaŭ lia devo, atenti *tempon kaj situacion*, kiuj prezentas al la serĉanto la kondiĉojn por *povi* enpreni en sin plenan klarigon. Ĉar la animo estas *ne ĉiam* kaj en *ĉiu* situacio kapabla, vere kaj sendistorde enpreni la bildon, kiun la radiojn de spirita lumo povas por ĉiam stampi en ĝin.

Krome, oni ne devas esperi ricevi spiritan gvidadon per unu el la lumantoj de la pralumo sur tiu ĉi tero, dum oni ankoraŭ arogas al si, ke oni posedas senerare ĝustan ekkonon, kaj ke la gvidanto certe devas subordigi sin al tiu treege „logika“ ekkono.

Oni ankaŭ ne devas esperi atingi veran *spiritan* gvidadon, se oni deziras ĝui ĝin *kvazaŭ kiel flankan aferon* kaj estas ankoraŭ tiom malproksima de tio *spirita*, ke oni konfuzas *la realan spiriton* kun cerbaj akrobataĵoj, kredante, ke ĝi estas atingebla *ankaŭ sen* gvidado, aŭ eĉ intencante, elmeti la atendantan gvidadon al sagaca dialektiko kiel materialon.

Nur „*kiu estas de Dio, tiu aŭskultas la vortojn de Dio*“, kaj la abunda lumo de la „*vorto*“, kiu estas „*kun Dio*“ kaj kiu estas „*Dio*“, estas perata *sole* tiam, se vere *spirita* gvidanto montriĝas en la vivo de iu animo. –

Miaj vortoj, kiuj estas parolitaj *surbaze de sperto*, kaj kiuj sukcese helpis ne malmultajn homojn, liberigu multajn aliajn el la polipa stringado, en kiun ili mem enigis sin!

Tiom multaj kiom eble da serĉantoj, kiuj estas maturaj por tio, estu kondukataj per tiuj ĉi vortoj renkonte al vera *spirita* gvidado!

Sed kiu pensas, ke lia plejsanktaĵo estas ofendita per tio, kion mi tie ĉi devis diri, tiu portempe pardonu min kaj pacience atendu, estante konscia pri sia sincera strebado, ĝis ankaŭ *liaj* okuloj estas *malfermataj!*

Oni raportas ankaŭ pri la alta sanktoleito el Nazareto, ke li plurfoje estis tentata de „la diablo“.

Strikta fastado neatendite rezultigis en la konsekrito „mediuman“ situacion.

Sed li *rezistis* la tenton, kaj ekde tiam li sciis „*elpeli* demonojn“, kiuj estas nenio alia ol tiuj lemuraj estaĵoj de la nevidebla regiono de la fizika mondo, pri kiuj mi tie ĉi devas averti.

Okultismaj ekzercoj

Post kiam la plej kruda formo de filozofia materialismo bankrotis kaj la natursciencoj ne plu estas rigardataj kiel la ununura fonto de ekkono, tiu aŭ alia, kiu iam pensis, ke li povas lasi la ĉielon al „anĝeloj kaj paseroj“, nun proksimiĝas al la problemoj de supersensecaj aferoj. Kaj ĉar li kunportas kun si el sia antaŭa esplorado labormetodon, kiu tie rezultigis sukcesojn, li senhezite kredas, ke li povas apliki tiun ĉi metodon al la tute alispeca regiono de *supersensecaj* aferoj.

Tio, kion li plejfavoraokaze atingas, igas lin ekkoni tre baldaŭ, ke li tie ĉi uzas netaŭgan ilon.

Aŭ li tiam ĉesigas sian esploradon, opiniante ke tie, kie *lia* ilo ne povas esti uzata, nenio reala estas trovebla, aŭ li plue eksperimentas kaj subfalas al la nevidebla regiono de la *fizika* mondo, kiun li tiam rigardas kiel la serĉitan „spiritan“ mondon. Ĉar ĝi liveras al li nur tre malabundajn, dubindajn rezultojn, li pli aŭ malpli frue komencas uzi nepermesitan rimedon, anstataŭigante per spekulativa *pensado* tion, kion la *realo* ne donas al li.

Sed tie ĉi temas pri personoj tre seriozaj, dum samtempe pli kaj pli ofte troviĝas homoj de alia speco, kiuj ruze uzas la *ŝajnon* de scienceco por varbi anojn por la kara propra persono aŭ por iu, kiu en sia estinta, reale scienca strebado rigardis sin ne sufiĉe aprezita kaj nun deziras atingi renomon en tiu ĉi kampo.

El ĉio, kion oni legante kolektis el pli aŭ malpli seriozaj literaturaj fontoj, jen oni rapide miksas „spirito-sciencan“, kaj

tiun magian drinkaĵon ĝuas ĉiuj, kiuj malgraŭ doktoreco kaj aliaj titoloj ne tute sufiĉis al sia ambicio, kaj kiuj nun vidas antaŭ si kampon, en kiu oni povas promenadi laŭ la modelo de la honorata „granda instruanto“, estante libera de ĉiu fremda scienca kontrolado. Tiel oni tre rapide akiras la reputacion de granda „inicito“, se oni tre fervore plenumas la „ekzercojn“, kiujn priskribas sinjoro la „sekreta instruanto“ kaj da kiuj li havas riĉan sortimenton por ĉiu alveninto; – „ekzercoj“ elprenitaj, kun la sama lerteco kaj kun la sama senrespondeco, el la ekzercoj de Ignaco de Lojola, sed ankaŭ el la plej malbonaj traktaĵoj de okultismaj kuiristaĉoj de oriento kaj okcidento.

Ne malutilas, se tie kaj tie iu el la „sekretaj disĉiploj“ subite eniĝas en frenezulejon, se la kompatindaj inoj de honorinda aĝo, svarmantaj ĉirkaŭ la „sekreta instruanto“, fariĝas historiaj, aŭ se la tro naivaj kredantoj ruiniĝas je menso kaj korpo!

La „sekreta scienco“ volas havi siajn viktimojn, kaj sinjoro la sekreta instruanto jam antaŭ longe edukis siajn fidelulojn tiel, ke ili kvazaŭ laŭ komando atakas la kompatindan perditon kaj ŝarĝas lin per la tuta kulpo pri lia malfeliĉo, ĉar oni neniel devas aŭdaci dubi pri la neeraripoveco de la „granda instruanto“, alie oni mem riskus perdi sian propran belan pozicion kiel kardinalo de tiu nova papo, kaj la tuta cirka pantomimo jen prezentata povus subite finiĝi.

Do plue sekvas „ekzercoj“ post „ekzercoj“, kaj la amaspsikozo estas kontaĝa kiel kokluŝo, ĉar ĉiam troviĝas sufiĉe da rezistkapablaj cerboj, kiuj eltenas ĉiujn ĉi procedurojn, kaj kiu vere povas elteni ilin, tiu estas *daŭre* armita kontraŭ ĉiu

kontraŭdiro fare de la sana prudento, kontraŭ ĉiu serioza psikologia kritiko de tio, kio okazas en li; – li ne plu *povas* voli aliamaniere ol volas la „granda instruanto“, kaj ĉi tiu modeste volas nenion alian ol vidi la tutan mondon je siaj piedoj, indifere, en *kiu* maniero tio povas esti atingata.

Sed ni portempe lasu flanke tiujn klaŭnaĵojn, kiuj povis esti ĝi nur tial, ke la tempo estis matura por tio, kaj ke nia tempo estas *malsana, mizere malsana*, – tiel ke ĝi avide sin ĵetas al la piloloj kaj ŝmirplastroj de ĉarlatanoj, ĉar la laŭordaj kuracistoj ne plu povas eltiri ĝin el ĝia mizero.

Prefere ni tie ĉi ekzameni tute ĝenerale, kiu reala valoro eble tamen *povus* esti atribuata al „okultismaj ekzercoj“, ĉar ankaŭ ekstere de la supre karakterizitaj rondoj ekzistas sufiĉe da homoj, kiuj atendas ĉion imageblan kaj neimageblan de „okultismaj ekzercoj“, aŭ turmentas sin mem per la plej malsaĝaj ceremonioj kaj animaj gimnastikaĵoj, ĉar ili esperas, ke ili povas tiumaniere superruzi la mondoordon kaj lerni „la sorĉadon“, – sed almenaŭ, ke ili fariĝos tiom saĝaj kiom la serpento en la paradizo, kiu, kiel konate, sciis, kiel oni fariĝas „*kiel la dioj*“. Sed iliaj kredantaj disĉiploj evidente manĝis la faman frukton ne „*en la ĝusta maniero*“, tiel ke la instruado ne tute rezultigis la deziritajn sukcesojn.

Oni ja *ne devas erari* farante tiujn ekzercojn, alie oni atingas la kontraŭon de tio, kion oni volis atingi, kaj tiam la rezulto estas tre malbona.

Tiel parolas *ĉiuj* grandaj „adeptoj“ de la magio, kiuj mem ne povas movi eĉ unu pajleron en alia maniero ol ĉiu alia homo, sed kiuj konas ĉiun riton, ceremonion, formulon kaj

ekzercon, kiuj estas necesaj por dancigi ĉiujn kosmajn leĝojn en amuza kirliĝo laŭ ilia fajfilo.

Estus facile, kunmeti gigantan bibliotekon el la literaturo pri magio konservita el antikva tempo kaj pligrandigita en nia tempo, sed oni montru al mi *nur unu solan* el la entuziasmaj adorantoj de tiuj skriboj, kiu reale, kaj sukcese kontentiginte ĉiun kritikon, atingis iun el la rezultoj promesitaj al la novico kun mistera komplikeco, kondiĉe ke li ekzakte sekvas la instrukciojn, pri kiuj ties aŭtoroj diras, ke *ili mem* atingis rezultojn sekvante ilin.

Ĉiuj kapoj, kelkaj el ili eĉ *tre prudentaj*, kiuj lasis sian cerbon konfuzi per tia legaĵo kaj atingis nenion alian, do „*ne agadis ĝuste*“. –

Sed iam ekzistis homo, kiu diris: „Se vi havas *fidon*, kiel semero de sinapo, vi diros al ĉi tiu monto: ‚Translokiĝu tien de ĉi tie!‘, kaj ĝi translokiĝos; kaj *nenio* estos neebla al vi.“

Kaj en alia loko oni raportas samsencan parolon de li: „Se vi havus *fidon* kiel semeron de sinapo, vi dirus al ĉi tiu morusarbo: ‚Estu elradikigita, kaj estu plantita en la maron!‘ kaj ĝi obeus al vi.“

Ankaŭ li havis *disĉiplojn*, kaj ili petis lin: „Aldonu al ni *fidon!*“

Kaj tie ĉi ni fine estas je la *kerno* de la *vera* magio, la *praktika spirita saĝo!*

Ankaŭ tie ĉi ekzistas „ekzercoj“, sed ili estas de esence *alia* speco, kaj ili kondukis *ĉiun*, kiu plenumis ilin, al realaj rezultoj, – sed ili ne estas „okultismaj“ ekzercoj, kvankam ilia regiono restas mistera, kaj kiu faradas ilin, tiu bezonas nek ceremonion nek riton, ne bezonas magian formulon aŭ aven-

turecajn citadojn, kaj tamen li agas per la „magio de la vorto“, per kiu li atingas la „*Pravorton*“, en kies „nomo“ li faras ĉion. –

Tiu „nomo“ ne estas vorto el iu lingvo, vorto, kiu devas nur esti prononcata en mistera maniero, sed ĝi estas tiu alta *forto*, kiun la majstro de la evangelioj nomas „fido“, kaj la mistera „prononco“ de tiu „nomo“ estas la arto de ĉiuj artoj: – la arto, kiel *sperti* tiun „nomon“ *en si mem*.

Ĉiuj „ekzercoj“ de tiu *vera* magio sole celas, ke oni lernu *sperti* la fidon en si, kaj *ne* volas instrui „okultajn artojn“, *ne* volas eduki „klarvidantojn“ aŭ fakirojn.

Sed veraj *spiritaj* ekzercoj estas unuflanke pli facile, aliaflanke iom pli malfacile plenumebla ol tio, kion oni devas nomi „*okultismajn*“ ekzercojn, ĉar, kontraste al tiuj ĉi, ili postulas ne nur pohoran „koncentriĝon“, *sed la tutan homon, lian tutan taglaboron, lian tutan manieron de agado*; – ili volas vidi „*novan*“ homon estiĝi el la materialo, kiu ĝis nun servis al la manifestiĝo de la „*malnova*“, kaj la procedo de transformado ne devas restigi iun skorion.

Ĉio, kio ĝis tiam servis al la efikado de la vivo, devas nun fordoni sin mem, por vivi *el la „fido“*. –

Oni tre miskomprenas la vorton „*fido*“, se oni supozas, ke la ŝanĝiĝo tie ĉi postulata, kiu kapabligu la homon vivi en „*fido*“, estas „*ŝanĝiĝo de opinio*“, koncernas la „kredantan“ aŭ „nekredantan“ konduton rilate al iuj raportoj en „sanktaj“ libroj, aŭ dependas de la rifuzado aŭ aprobado de certaj asertoj faritaj de religiaj instruantoj! –

Se fariĝas „savita“ *tiu*, *kiu* „*fidas*“, li vere ne fariĝas *tia* pro tio, ke li opinias ĝusta iun metafizikan instruon, sed ĉar li akiris la arton, kiel uzi la *forton*, pri kiu mi tie ĉi parolas, – ĉar li *vivas* el la „fido“, el la forto de la „nomo“, kiu estas la vorto, kiu estas „kun Dio“ kaj kiu estas „Dio“!

Oni „*fidas*“ en ĝusta maniero, ĉar oni havas la „*fidon*“, same kiel oni *vivas*, ĉar oni havas la *vivon*.

Antaŭ vi kuŝas beto sur la kampo. Mi metas vin en hipnoton kaj per mia sugesto *devigas* vin „kredi“ (tie ĉi *ne* en la ĉiutaga senco), ke vi ne kapablas levi la beton, kaj vi vane provos levi ĝin de la grundo eĉ nur iomete.

Mi *liberigas* vin el la hipnoto, kaj vi levas la saman beton tre facile; vi eĉ mokridos ĉiun, kiu volus dubi pri tiu via kapablo, ĉar nun vi ne nur *kredas* (en la ĉiutaga senco) je la ĝusteco de la frazo: „mi *povas* levi beton de la grundo“, – ĉar vi kredis (en la senco de „akcepti kiel veraĵon“) je la ĝusteco de tiu frazo ankaŭ en hipnoto, *spite de* mia kontraŭa sugesto, alie vi tute ne estus peninta tamen *provi* fari tion, – sed nun vi reale „*fidas*“, t.e. vi sentas en vi la *forton* por levi la beton, kaj tiu ĉi forto, per kiu vi fakte ĉiutempe *povas* levi ĝin, estas nenio alia ol la „*fido*“ postulata de la majstro de la evangeli-oj. Sed ĝi prefere estu aplikata al aferoj iomete pli gravaj ol tiu kompatinda beto, tie ĉi kvazaŭ ĉase pelita ĝis morto. –

Tiu ĉi „fido“ estas *ne* la per sperto akirita *certeco*, ke oni povas fari ion, sed la *forto*, per kiu oni fakte *povas* fari ĝin!

Kuŝas nedireble subtila ironio en la dusenca parolo, kiun la majstro el Nazareto direktas al la nekredema Tomaso: „Ĉar vi *vidis* min, vi kredas“ (trovas la raporton ĝusta); „sed feliĉaj

estas tiuj, kiuj *ne vidis*“ (ne havas certecon rezulte de sperto), „kaj tamen kredas.“ –

Jen miriga vortludo de la majstro, kiu uzas la vorto „kredi“ *unue en la ĉiutaga senco*, sed *tiam* uzas ĝin *aludante al la instruo* proklamita de li dum jaroj.

Ĉu tiu parolo estas „historia“ aŭ ne, ĝi tamen montras pli ol iu alia parolo lia, en kiom supera maniero la majstro instruis, kiel li sciis sproni la sagacecon de siaj disĉiploj, ne malofte utiligante vortludon kaj ironion.

Sed temas tie ĉi *tute ne pri la sola* parolo de tiu ĉi speco, kaj kelkaj eldiroj samspecaj rezultigis sovaĝajn kverelojn pri dogmoj en la fluo de la tempo.

Sed kiel rilatas la *forto* proklamita de li – kiun li pro bonaj kaŭzoj nomas „*kredo*“, malgraŭ ĉiuj ebloj de eraro – al tio, kion „*okultismaj* ekzercoj“ celas aperigi?

Nun oni antaŭ ĉio devas klarigi al si, ke ekzistas *du tute diferencaj specoj* de fiziksense nepercepteblaj fortoj, depende de la vivregiono de l’ universala esto, al kiu ili apartenas.

Ambaŭ estas – ĉiu en *sia* regiono – „*tio sola reala*“, kiu estas la bazo de ĉiu fenomeno, kaj ambaŭ en *sia* regiono staras je unu ŝtupo *pli malalte* ol tio, kio estas perata de ili.

Se mi diras, ke tiuj fortoj estas en *sia* regiono la *bazo* de ĉiuj „fenomenaj mondoj“ (da tiaj ekzistas fizikaj kaj spiritaj), mi volas, ke tio estu interpretata tiel same, kiel se mi diras, ke ĉiu pentraĵo, indiferece, *kion* ĝi prezentas, baziĝas sur *koloroj*, ke la *kolormaterio* en ĝi estas „*tio sola reala*“, kvankam *tio prezentita* per la farbo povas sciigi pri *multe pli signifa realo*, – kiun *tie ĉi* mi povas konscii nur *per* la kolormaterio.–

Tiel same, ni povas konsciiĝi pri la tuta universo nur tial, ĉar ĝi baziĝas sur la okultaj fortoj *de la fizika naturo* – kiuj estas „tio sola reala“ malantaŭ ĉiuj formoj – kaj ĉar ni, estante *parto* de tiu naturo laŭ la *korpa aspekto, mem estas* unu el tiuj *fizikaj* okultaj fortoj kaj ni posedas, en nia ŝajne „krude materia“ korpo, la instrumenton de la *pli fajnaj, fluidecaj* korpofortoj, kiun la plej multaj homoj rigardas kiel la animon, sed kiun posedas ankaŭ la aliaj animaloj de tiu ĉi tero, kvankam ĝiaj kapabloj havas tre diversan mezuron. – –

Kiel la tuta *fizika* universo prezentiĝas nur kiel efiko de *fizikaj* okultaj fortoj, tiel same ankaŭ la *spiritaj mondoj* prezentiĝas nur kiel efiko de realaj *spiritaj* okultaj fortoj, kaj tiuj ĉi estas nenio alia ol: la regno de la fluegantaj *animaj fortoj*, regno, kiu situas meze inter la *fizika* kaj la *spirita* fenomenaj mondoj.

Kiel en la fizika mondo ni povas percepti kaj „konscii“ nur tial, ĉar *ni mem estas* unu el ĝiaj *fizikaj* okultaj fortoj kaj portas en nia korpo la pli fajnajn fluidecajn fortojn de tiu ĉi mondo, tiel same ni povas percepti *ion spiritan* – kaj konsciiĝi en la *spirita regno* – nur tial, ĉar samtempe *ni mem estas* unu el la *spiritaj* okultaj fortoj kaj portas en ni *spiritan* okultan aŭ *animan organismon*, sen kiu la spiritaj mondoj, kies „substancon“ konstituas tiuj ĉi animaj fortoj, neniam povus esti percepteblaj al ni, – sen kiu ni neniam povus konsciiĝi en la *spirito*.

Se oni praktikas tion, kion oni propre komprenas sub „okultismaj ekzercoj“ – tio ampleksas ĉion, kion la hindoj nomas „*Hâta-jogo*“, kaj multon alian, kiun ekde antikva tempo oni kutime faris ankaŭ ĉe ni en Okcidento – tiam oni uzas nur la *pli fajnajn, fluidecajn fortojn de la korpo*, influante nur la

okultajn fortojn de la *fizika* mondo. Rezulte de tio, laŭ neŝanĝeblaj leĝoj de la *fizika* universo, oni fariĝas daŭra servanto de la estaĵoj, kiuj havas siajn kampojn de agado en la nevideblaj regionoj de la *fizika* naturo, kaj oni neeviteble subfalas al „obsediteco“ – laŭ populara diraĵo, oni „skribe promesis al la diablo“ sian animon – ĉar la vera *animo*, la okulta *spirita* organismo, estas *damaĝata* en la sama grado, en kiu la pli fajnaj fluidecaj fortoj de la *korpo* estas transdonataj al tiuj estaĵoj, kiuj estas transe de bono kaj malbono, sen respondeco kaj moralo. –

Okazas *malpliigo*, iom-post-ioma *malligiĝo* de ĉiuj veraj *animoelementoj*, kiuj formas la individuan, eternan animo-organismon, al kiu la pli fajnaj fluidecaj fortoj de la korpo estus devinta *servi*.

Oni fakte povas akiri mirindajn kapablojn pere de Hâtaĵo aŭ similaj „ekzercoj“, en kiuj certa trejnado de l’ spiro kune kun fastado, seksa abstinado, vegetala dieto kaj similaj aferoj ludas gravan rolon sed – tiumaniere oni *neniam* povas proksimiĝi al la mondoj de la *spirito*; *kontraŭe*, oni *mem fermas al si la pordon*, kiu *kondukas al la regno de la esenca spirito*, kaj neniu potenco de la tero kapablas remalfermi ĝin dum tiu ĉi surtera vivo.

Estas feliĉa fakto, ke tiuj „ekzercoj“ ne estas tiom facile *praktikeblaj*, kiel la sorĉistoj-lernantoj supozas, kaj ke la plej efikaj metodoj de tiu speco estas preskaŭ nekonata, almenaŭ sur la okcidenta flanko de la tergloblo.

Do multaj homoj, kiuj strebas al „okultaj fortoj“, ludas danĝeran ludon, sed *feliĉe* ili malgraŭ sia tuta penado agas „ne ĝuste“, kaj ankaŭ tiuj, kiuj transdonas tiajn „ekzercojn“ al

aliuloj, nur aŭdis ion malklaran pri ili, dum *tio plej esenca* restis *kaŝita* al ili, por la bono de la homaro. –

Malgraŭ iu hazarda sukceso, kiu foje povas okazi, la mal-feliĉulo praktikinta tiajn „ekzercojn“ atingis nenion alian, ol ke li faras okultismajn artaĵojn (pleje je la damaĝo de siaj kunhomoj!) helpe de estaĵoj, antaŭ kiuj li sentus hororon, se li povus vidi ilin tia, kia ili *estas*, – aŭ ke li subfalas al plej frenezaj trompoj preparitaj al li per la agado de tiaj estaĵoj.

Temas pri speco de *aktiva* „spiritismo“, se oni volas nomi la median agadon de la „spiritistoj“ *pasiva* „spiritismo“.

La fino de homo, kiu ekiris sur tiun vojon, estas neniam ĝojiga kaj pleje multe pli malbona ol la fino de la plej multaj „mediumoj“.

Mi sufiĉe parolis pri tio en aliaj lokoj de miaj skriboj ...

En plej akra kontrasto kun la *metodo* kaj la *rezulto* de tiu praktikado en la regiono de la okultaj fortoj de la *fizika* mondo, staras la utiligo de la magiaj fortoj de la *spirito*, la uzado de la *animoelementoj* por vera magia laboro.

Jam ĉe HELIODORO en la tria libro de lia romano „AETHIOPICA“, alte estimata ankaŭ laŭ la literatura vidpunkto, ni trovas la teksteron atestantan pri plej alta saĝo:

„La *unu* magio estas *por la popolaĉo* kaj, por tiel diri, ĉiam iradas *malalte sur la tero*; ĝi okupiĝas je *fantomoj* kaj interluktas kun kadavroj. Sed la *alia*, la *vera saĝo*, kiun ni sacerdotoj kaj profetoj penadas akiri ekde nia juneco, rigardas *alten al la ĉielo*, interrilatatas kun la *dioj* kaj *partoprenas* en la naturo de la potencaj estaĵoj ...“

Kiu povus ankoraŭ dubi tie ĉi, *kiun* specon de magio la alta majstro el Nazareto instruis! – –

Kaj la instrukcioj, kiujn li donas por atingi tiun veran magion, kondukas supren de ŝtupo al ŝtupo.

Oni legu la *surmontan predikon*, kaj oni scios, kiuj ĝenerajaj „*antaŭekzercoj*“ ŝajnas al li nepre necesaj. Sed se oni serĉas „*ekzercojn*“ *por progresintoj*, tiam ĉiu el liaj paraboloj parolas kiel tutaj libroj, aparte de tio, ke li tre klare diras al siaj disĉiploj:

„Al vi estas donite scii la *misterojn* de la regno de la ĉieloj, sed al aliaj ili sciiĝas *nur* per paraboloj.“

En la paraboloj li diras *tion*, kio estas necesa *sole* kiel „*ekzerco*“: la *direktiĝo de la konscio* al la stimuloj de la fortoj de l' *animo*, kaj la *sekvado*, kiun la volo ŝuldas al tiuj stimuloj.

Sed al siaj *disĉiploj* li montris ankaŭ la *manieron de efikado de la spiritaĵoj*.

Al ili li montris, *kial* devas esti farata tio, kion li rekomendis en parabolo.

Al ili li ankaŭ sciigis, kiel oni *forpelas* „malbonajn spiritojn“ – kiuj estas la interaj estaĵoj de la nevidebla parto de la *fizika* mondo –, tuj kiam ili kaŭzas damaĝon al la animo.

Jen *komprenita*, jen *misinterpretita* de la aŭskultantoj, li gvidas siajn disĉiplojn al saĝoinstruo, kiu povas „esti malkaŝata“ al infanoj, sed „restas kaŝita“ for de orgojluloj kaj tromemfiduloj. –

Kaj tamen li diras la vorton: „Mi havas *ankoraŭ multon* por diri al vi, sed vi ne povas ĝin nun elporti“ kaj tiel atentigas la instruojn pri tio, ke, por ĉiu vere preparita homo, „la spirito de la vero“, la *vera dia spirita fajrero* venos en la veran „*mion*“ *de la animo*: – la „*vivanta Dio*“, kiu gvidos ilin en „ĉian veron“, kiu prenos nur el la „*siaĵo*“, kvankam li iam parolos el *alia* buŝo. –

Mistera restas tiu dusenca vorto, ĉar ĉio, kion la sanktoleito mem donis, venis el la maro de spiritaj trezoroj de la „*vivanta Dio*“, kiun li portis en si kaj kun kiu li plenkonscie estis unuiginta sin, same kiel ĉiu de la „*siaj*“, kiujn li vidis veni *post* si.

„Se mi parolus *de mi mem*, mi estus mensoganto, sed mi *ne* parolas de mi mem, sed kion *la Patro* parolis al mi, *tion* mi diras al vi!“

Neniu el tiuj, kiuj parolas el la vero, parolas *de si mem* tion, kion li instruas, kaj neniu havas la aŭtoritaton montri la vojon al unuigo en la spirito, se li ne portas *la Patron* viva en si, se li ne plenkonscie vivas en *unuigo* kun sia „*vivanta Dio*“. –

Ne estas necese, ke mi tie ĉi ripetu ĉiujn instrukciojn, kiujn mi jam donis en tiom da lokoj kaj manieroj.

Estis permesate al mi paroli pri kelkaj aferoj, pri kiuj la majstro el Nazareto ankoraŭ ne povis paroli al siaj disĉiploj, ĉar ili estus estintaj „*tro pezaj*“ por ili, kaj mi havis tiun permeson nur tial, ke ĉio ĉi, kvankam en *distordita* formo, jam de longe estas konata al la publiko, kiu tamen ne atentis ĝin.

Mi *devis* doni informon pri tiuj aferoj, ĉar la distordita formo, en kiu venis sciigo pri tio al la homaro, jam kaŭzis nedireblan *malfeliĉon*, kaj ĉar tiu malfeliĉo devis finfine *ĉesigata*. –

Tial estas grave, disvastigi la ekkonon, ke povas sendanĝere eniri en la okultan mondon de la *fizika* naturo nur *tiuj* homoj, kiuj denaske havas la taŭgecon por tio kaj poste estis *instruataj* de aŭtoritata gvidanto tiel, ke ili povas *sekure regi* la fortojn tie ekzistantajn.

Tiaj gvidantoj estas sole la *lumantoj de la Pralumo*, la „majstroj“ de la „Blanka Loĝio“, kiuj *devis* fariĝi liberaj *regantoj* de la okultaj fortoj de la fizika naturo, antaŭ ol povis transdonataj al ili en tiu ĉi surtera ekzisto la ŝlosiloj, kiuj solaj malfermas la pordon, tra kiuj por ĉiuj homoj de tiu ĉi tero kondukas la vojo al la regnoj de la spirito. – –

Kiu tiumaniere legitime akiris la kapablon uzi la fortojn de la pli fajna, fluideca korpo, tiu ankaŭ povas, en konkreta okazo, krei *benan* efikon.

Sed por *ĉiuj aliaj*, tiuj fortoj neeviteble estas fatalaj.

Sed kio alportas benon al *ĉiuj*, senescepte, tio estas la disvolviĝo de la okultaj *spiritaj* fortoj, la fortoj de la *animo*.

Kiel oni lernas uzi tiujn fortojn sub sekura interna gvidado, kiu venas al ĉiu, kiu mem honeste kaj serioze komencas ekzerci tiujn fortojn *per agado*, – tion instruas plej detale la instruo de mi skribita, kiu ĉerpas el neniu alia fonto ol la fonto de eterna saĝo, kiun la alta majstro el Nazareto nomis la „*spirito de la vero*“, kaj pri kiu li sciis, ke ĝi estas eterne neelĉerpebla, donanta benon eĉ al la plej foraj estontaj generacioj.

*

*

*

Mediumismo kaj arta kreado

Ĉe mediumismaj okazintaĵoj, ŝajnas esti malfacile por la koncernatoj tute ignori, kiun rezultaton donas la manifestaĵoj de la koncernaj nevideblaj estuloj. –

Se oni ricevas „sublime“ sonantajn sciigojn, aŭ eĉ konsilojn por la ĉiutaga vivo, kiuj foje *montriĝas taŭgaj*, oni estas tuj preta supozi la agadon de „altaj spiritaj gvidantoj“. Tio povas atingi tian mezuron, ke oni blinde konfidas sian vivosorton kaj sian materian estontecon al la influoj de tiuj laŭsupoze altaj „spiritaj estaĵoj“.

Oni ne rimarkas, ke oni troviĝas en speco de hipnoto, kaj obeeme sin fordonas al la impulsoj de fremda volo.

De *kiu speco* tiuj estaĵoj *reale* estas, mi detale montris en mia „*Libro pri la transa mondo*“, en la „*Libro de la reĝa arto*“ kaj ankaŭ en tiu ĉi libro. Temas nek pri „karaj mortintoj“ nek pri altaj aŭ malaltaj „*spiritaj estaĵoj*“, sed pri nevideblaj estaĵoj de parto, ĝenerale fermita al ni, de la fizika mondo. –

Tiuj estaĵoj estas nek „bonaj“ nek „malbonaj“; sed *senmoralaj*. Ili volas nur *manifestiĝi* al la homo, kaj certaj homoj kun aparte taŭga psikofizika dispozicio estas por ili tiucelaj aparatoj kaj servas nur por ilia memkontentigo.

La estaĵoj, pri kiuj temas tie ĉi, agadas, *laŭ la kosma ordo*, kiel *formantoj* ene de la fizika fenomena mondo.

Ĉu do estas mirige, ke ili ankaŭ en siaj *neregulaj* provoj manifestiĝi en kvazaŭ „nedecaj“ lokoj, agas kiel *formkreatoj*?

Ekzistas diversaj specoj de manifestiĝo de tiuj estaĵoj, en kiuj ili montriĝas kiel *formkreantoj* laŭ sia naturo. Unu el tiuj specoj konsistas en tio, ke la mediumo estas uzata por prezenti formojn pere de desegnaĵoj aŭ pentraĵoj, kio estas okazo tre ofte observita en la historio de la mediumismo.

Mi mem observis sufiĉe da tiaj manifestiĝoj kaj spertis multe pli mirigajn aferojn similajn. Sed la diferenco estis, ke *mi* havis potencon super la estaĵoj uzantaj la mediumon, tiel ke ili devis fari, kion mi ordonis al ili.

Ĝuste la manifestiĝoj sur la kampo de pentrado unuavide ŝajnas relative sendanĝeraj, sed la afero ne estas tia.

Ĉiu esprimado de tiuj ĉi estaĵoj postulas de la mediumo plenan aŭ preskaŭ plenan *fordonon de la propraj voloimpulsoj*. Tiel la fortoj de la mediumo estas transdonataj al estaĵoj, kiuj sen la plej malgranda sento pri respondeco strebas *nur al sia propra* kontentigo, indifere, ĉu rezulte la mediumo restas anime sendifekta aŭ ne.

Tiuj estaĵoj ĉiam instinkte serĉas kaj trovas en sia viktimo *la punkton de plej malgranda rezisto*.

Ili ĵetas al ĉiu tiun logaĵon, kiu lin igas ekmordi ...

Tiuj estaĵoj efikas sur la fortojn de la *animo*, kiun ili uzas, ĝuste tiom pereige kiom baciloj kaj aliaj mikroboj sur la fortojn de la fizika *korpo*.

Tial oni *ne povas sufiĉe frue ekkoni* tiun danĝeron, kiom ajn „belaj“, „sublimaj“ aŭ „interesaj“ la fenomenoj eble estas.

Eĉ se oni tiuĉimomente ne rimarkas iun damaĝon, ĝi *ĉiam* okazas, kaj en la plej multaj okazoj, en kiuj oni *ne frutempe* agas kontraŭ la danĝero, la damaĝo estas neriparebla.

Oni ne povas sufiĉe averti kontraŭ tia ludo kun neniel regeblaj estaĵoj!

Certe ĉiu vera *artista* estas, dum li kreas, servanto de sia interna Dio! Certe li scias aŭskulti internen kaj konas la „internan voĉon“!

Certe li ankaŭ ne povas diri, de kie venas la spirito pleninganta lin!

Sed *kiam* kaj *kie* iu kreanta artista devis transdoni sin al tiu spirito *en la maniero de mediumo, sentante sian manon mekanike movata*, kaj formante verkojn, kiuj ne antaŭe necesigis propran *povoscion*? –

Kie estas la kreanto, de DANTE ĝis GOETHE, de GIOTTO ĝis niaj *plej modernaj* pentristoj, kiu ne devis *lukti* por trovi la *esprimon* de tio interne movanta lin, – kiu ne devis en multjara studado akiri la bazon, per kiu li entute povis *fariĝi* servanto de sia Dio?! –

Neniam „inspiro“ en la artista forprenas de li lian *memregadon*, neniam li fariĝas nur *mekanika aparato*, sed okazas la rekta kontraŭaĵo! –

Ĉiu pene akirita *povoscio* estas alvokata, *ĉiu anima kvalito* de la kreanto estas konsciata pli vive kaj *en pli alta grado*, ĉiuj *fortoj de la animo* fariĝas leĝeraj kaj liberaj, dum *la propra „mio“* agas kaj regas en maniero tiom fortoplena, ke la artista, kiam li poste ree apartenas al la ĉiutaga vivo, sentas *sin mem fremda* kaj inklinas al la opinio, ke li ne povas esti tiu sama, kiu dum la horoj de kreado sciis aperigi ĉiujn siajn animofortojn en tiom suverena maniero.

Tie ĉi ekzistas neniom de la *pasiveco* de l' mediumo, kiu estas movata nur kiel la ranfemuroj, per kiuj GALVANI vidis la efikon de elektra fluo, – kiu apenaŭ bezonas rigardi la laboron, por kiu li pruntedonas sian manon, kaj kies „mion“ fakte la tuta afero tute ne koncernas, ĉar la vera aganto povas eks-

pluati sian viktimon multe pli bone, se li tute ne atentis tiun veran aganton, – *plej bone* en la tipa „stato de tranco“, do post plena fordono de sia konscio! – –

Tio, kion tiuj estaĵoj estigas per sia mediumo, *neniam* estas *originalo*, ĉar kvankam ili estas laŭ sia naturo *formantoj*, ili ne estas *kreantoj* de formoj, ne estas kapablaj estigi *propran penson* aŭ *propran ideon de formo*. Tie, kie ili *ne, laŭ sia naturo, servas kosmajn impulsojn*, do kiam ili provas regi „mediumon“, ili devas kolekti sian materialon el inter la *imagoj*, kiuj formiĝis *per homaj cerboj!*

Kelkfoje ili reproduktas tiajn imagojn *senŝanĝe*, tiel ke oni povas facile evidentigi, *de kie ili rabis* ilin.

Sed pleje estas nur *konfuzmaniere miksitaj fragmentoj*, el kiuj ili teksas siajn prezentaĵojn, indifere, ĉu temas pri pensaj „revelacioj“, aŭ pri mediumaj pentraĵoj kaj desegnaĵoj.

Estas necese, ke ni tie ĉi *tre klare* distingu inter *artista kreado* kaj *mediuma agado*, alie ni falos en preskaŭ diablan konfuzon de nocioj.

Tie ĉi rezultas por mi la *devo*, el plej sekura kono de la koncernaj fenomenoj, paroli laŭ la vero, tiom pli, ĉar ankaŭ *tiu ĉi* speco de lemura obsediteco estas tro ofte mire rigardata kiel ĉiela „dono“, kaj ni en tiu ĉi libro volas *pure kaj klare distingi* aferojn, kiuj estas *neniam akordigeblaj!* –

Ĉe la fonto de vivo

Vere, estas necese atesti pri la *vero* per novaj kaj novaj bildoj, la vero, kiu sen bildo kaj parabolo ne povas fariĝi *kapt-ebla*, ĉar ĝi estas *realo*, *praesto de ĉio ekzistanta*, *fonto de ĉiu vivo!* –

En nia tempo nenio kontraŭas al la konfuziĝo de la mensoj. Ĉiu atesto pri interna spertado estas tirata al lumo el la muciĉaĵo de tomboj, el la polvo de bibliotekoj, kaj prezentata al la tremantaj manoj de la serĉantoj kvazaŭ orakolo.

El ĉiu loko la serĉanto prenas tion, kio tie troviĝas kaj estas *trovebla*. Febrante li pasigas la noktojn super ampleksaj foliantoj, en siaj poŝoj li portas kun si la plej dubindajn traktaĵojn kvazaŭ sanktaĵon, kun solena respekto li ĉie aŭskultas la obskurajn vortojn de nekompetentaj instruantoj, kaj fine tamen esperas iam *trovi* la vojon, kiu kondukas al la *fonto de vivo!*

La kapoj estas plenigitaj per la plej strangaj fantaziaĵoj de aventuraj mistagogoj; bizara „scienco“ pri aferoj, kiuj neniam povas *fariĝi* la objekto de scienco, sin prezentas grandgeste per paroloj kaj skriboj al la mireganta mondo, la arsenaloj de homa superstiĉo el ĉiuj tempoj estas traserĉataj kaj malplenigitaj, kaj la plej sovaĝa okupiĝo pri fantomoj ree fariĝas moderna!

Sed tiu tuta konfuziĝo estas nutrata de arda *sopiro* de soifantaj koroj, kaj tre multaj el tiuj kurantaj post la plej novaj ebrigestaj kermesoproteoj venis nur tial, ĉar ili tute ne volis preterlasi okazon, kiu povus doni *direkton* al ilia konfuza *serĉado*...

La homoj, kiuj tiel fariĝas viktimoj de senrespondecaj konfuzuloj kaj impertinentaj babuladuloj, tute ne estas la plej malbonaj!

La okuloj de multaj, kiuj lasis sin trompi, tamen ĝustatempe malfermiĝas, kaj ili tiam vidas kun indigno, kaj honto antaŭ si mem, ke ili estis doninta sin al „gvidantoj“, kiuj mem ne konis la vojon, kaj al kiuj neniam estis grave, vere gvidi ilin, – kiuj ruze travidis la malsaĝecon de siaj kunhomoj, kaj sciis prepari la *logaĵon* al la sopiro de serĉantoj, por logi ilin en la reton.

Ankaŭ inter la legantoj de tiuj ĉi vortoj probable troviĝas ne malmultaj el tiuj grave desapontiĝintaj!

Sed ili eble sentas *malgraŭ* sia seniluziiĝo, ke *tamen* devas ekzisti por ili vojo, sur kiu ili povus *atingi* la celon de sia sopiro.

Precipe al ili direktiĝu tiuj ĉi vortoj!

Kiu estas preta, *spite* de ĉiuj ekkonitaj eraraj vojoj, *persisti* en sia strebado, ĝis li trovis tion serĉatan de sia animo, tiu povas trovi la vojon al la libero, *la malvastan padon*, kiu kondukas al la *esenca lumo*!

Mi jam ofte montris tiun vojon kaj mi ree montras ĝin tie ĉi por ĉiuj, kiuj volas trovi ĝin.

Gvidado estas *necesa* sur tiu ĉi vojo, ĉar ĝi ofte kondukas tra densa ĝangalo, en kiu tre danĝeraj flankaj vojoj logas la sensuspektan migranton, – kondukas tra dezertoj, en kiuj ĉiu spuro estas tuj kovrata de la vento per sablo, tiel ke la vojo devas esti denove preparata por ĉiu migranto.–

La serĉanto estus *malsaĝa* kaj samtempe *aroganta*, se li volus kredi, ke li povus *distingi* la ĝustan padon laŭ *propra bontrovo!*

Sed li ankaŭ estus *malsaĝa* kaj *aroganta*, se li volus aŭdace opinii sin *kapabla* atingi sian *plej altan* celon, *sen* antaŭe trapasi la *provojn*, al kiuj liaj fortoj estos elmetataj dum la diversaj stadioj en lia vojo. –

Fine estus *malsaĝe* kaj *arogante*, se li esperus atingi en si mem sian plej altan celon, kiu estas *la konscio de unueco kun la prafonto de ĉiu vivo*, *sen la helpo* de homoj, kiuj jam atingis tiun celon. – –

Li tiam egalus montogrimpanton, kiu deziras atingi la *plej altan pinton* de la montaro sen unue ascendi la *antaŭmontojn* ĉirkaŭantajn la ĉefan pinton, kaj de kies altaĵo sola oni *povas* montri al li la ĝustan vojon al la sopirata *plej alta* alto de la montaro.

Al senkritikaj oreloj sonas kuraĝe la vortoj de iu diranta, ke „*nenio devas intermetiĝi*“ inter li kaj lia Dio, sed la „Dio“, kiu laŭsupoze tiel estas sentata, estas *trompa dio*, *formitaĵo de la propra imago*, kies realeco ne superas la realecon de *ĉiuj* imagaĵoj. –

Eble tia „*dio*“ de pia revulo dum kelka tempo donas konsolon al kredanto ligita al ĝi, – eble ĝi ekscitas fortojn en li, kiuj ankoraŭ plifortigas lian trompiĝon, ke li interrilatas kun la *prafonto de ĉiu vivo*, sed en la eterne *daŭranta realo* tia „*dio*“ estas *fantomo*, kiu neniam kapablas ŝanĝi eĉ la plej etan aferon en la *realaj donitaĵoj* de tiu *absoluta realo*. –

La homo, kiu estas kontenta je tiu speco de *pseŭdosperto pri Dio*, ne trovos sian „*vivantan Dion*“ en si, eĉ malpli ol homo nomata „*malkonfesanto de Dio*“, kiu pleje neas la „*ek-*

ziston“ de Dio nur tial, ĉar li iamaniere esence travidas la *pian trompon*, en kiun enprofundiĝas la alia, kiu kredas, ke li estas familiara kun „Dio“, kaj tamen adoras nur *formitaĵon* de sia *fantazio*. –

Certe, la „malkonfesanto de Dio“ tute pravas, kiam li neas la ekziston de *tia* dio, kaj lia eraro konsistas nur en tio, ke *li*, kiu *ekkonis* la fantomon kiel fantomon, nun *ne* serĉas la *realon*. –

Tamen la spertado de la *vera, en si mem vivanta Dio* povas iun tagon esti rezervita al li, dum la kredanto, kiu ligis sin al la *ŝajna dio* formita de li mem, povas nur tre malofte malligi sin el sia propra kateno.

Sed ekzistas *pliaj* ebloj trompiĝi, kaj multaj serĉantoj jam subfalas al ili.

Unu el la plej gravaj, kiu en la vivo de la plej multaj „mistikuloj“ ludas pli aŭ malpli dubindan rolon, estu tie ĉi priparolata.

Sen ia gvidado, sen ia helpo fare de homoj spirite vekigintaj, ĉiu homo povas percepti en si *spiritan lumon*, la bildon de *flamanta stelo*, kiun la monaĥoj de ATHOS ne sciis aliamaniere aprezi ol per tio, ke ili nomis ĝin la „sankta lumo de la Dieco“.

Sed ne nur la *monaĥoj de la monaĥejoj de ATHOS*, ankaŭ multaj aliaj mistikuloj kaj serĉantoj de Dio lasis delogi sin al tio, ke ili vidis en *tiu ĉi lumo* la konfirmon de la unuiĝo de sia animo kun la *vivanta Dio*.

Tamen ĉio, kion ili spertis, estis nur malforta rebrilo *de ilia propra plej alta vivoformo*; – ili estis fariĝintaj *memadorantoj*, dum ili kredis, ke ili estis trovintaj la *Diecon* ...

Ili vidis en si nur *tiun vivoformon de sia spirito*, kiu povas vekigi al *eterna lumado nur tiam*, kiam la „*vivanta Dio*“, plena de forto kaj realeco, faras ĝin la trono de sia gloro, – kiam li preparas al si mem la „naskiĝon“ kiel „infano de la virgulino“ en la homo de tiu ĉi tero, sciigita de la „*paŝtistoj*“, kiuj „nokte gardadis“, – adorata de la „saĝuloj el la oriento“, la pastoreĝoj el la „plej interna oriento“, kiu kapablas ĉie vidi la „stelon“, tuj kiam ĝi ekbrilas super „stalo“, kie „inter senprudentaj bestoj“ naskiĝas la *reĝo*, kiu volas „*savi*“ Izraelon.

Multaj parolis per entuziasmaj vortoj pri la „renaskado“ – pri la intima „amikeco“ de sia animo kun „Dio“, – pri la „spirita edziniĝo“ kun la „ĉiela fianĉo“, – – multaj kredis, ke ili atingis la „*nirvanon*“, – kaj tamen ili nur estis vidintaj en si la bildon de la „*flamanta stelo*“, kiu unue devas ricevi, por eterna lumado, la forton, kiun povas doni nur la „*Pravorto*“ kaj kiun ricevas neniu, kiu ne volas ekpaŝi sur la vojo, kiun *la „Pravorto“ mem* devis prepari al la falinta filo de la spirito, por ke ĝi refariĝu atingebla por li.

Ni homoj ne ekzistas *izolitaj!* Ni ĉiuj estas nur la efiko de eterna krea forto, kaj tial interligitaj per mil sekretaj fadenoj.

Kio ajn estas atingenda, – *unu* neniam povas sukcesi sen la *alia*, kaj en la reciproka harmonia efikado de unu sur la alia ĉiuj grandaj celoj de homa strebado estas atingataj. –

Se ni volas atingi ion nepre *solaj* kaj *sen* la helpo de alioj, ni per tio montras, ke ni ankoraŭ ne vidas nin mem kiel *tion*, kio ni *estas* kaj ankaŭ *estis de eterne* antaŭ nia „falo“. –

Ni tiam *devas* maltrafi la ĝustan vojon, eĉ se ni alstrebas *tion* plej altan kun la plej pura volo, kun la plej pura koro ...

Ankaŭ la *plej alta celo* de l' homo, la *spertado de la unu-
iĝo kun sia „vivanta Dio“ plena de forto kaj realeco*, estas
neniam atingebla por li, se li opinias, ke li ne bezonas la gvi-
dadon, kiun la eternaj saĝo kaj kompatado amanto preparis por
li.

Li *bezonas* tiun gvidadon, ĉar tiel estas ordigite *en la vivo
de la kosmo*, kaj li tute ne perdos ion el sia valoro per tio, ke
li *petas helpon*, same kiel rezulte ne povas pligrandigi sian
valoron la alia, kies devo estas *doni* la spiritan helpon, ĉar
ankaŭ *li* devis esti helpata, antaŭ ol li *povis* doni helpon al
aliuloj. –

Tie ĉi, unu mano donas al la alia tion, kion ĝi mem iam ri-
cevis, kaj neniu havas *sole el si mem* tion, kion li nun havas
por doni al aliuloj!

Nur el la radianta „*Pravorto*“ eliras „la vorto de la Eternu-
lo en la tutan teron“ kaj ĉiutempe kreas la *lumantojn de la
tero*, kiuj *povas* alporti *lumon* en la tenebron al siaj ankoraŭ
ne vekigintaj gefratoj, ĉar homo, kiu ne estis *preparita*, –
longe antaŭ ol li naskiĝis sur tiu ĉi tero kiel filo de sia patri-
no, – post sia „falo“ *ne plu* kapablas sen ia helpo enpreni tiun
lumon, kiu elfluas *sole* el la „*Pravorto*“, kaj kiu povas fari
„*vorton*“ *nur el tiu*, kiu, jam milojn da jaroj antaŭ ol la tero
donis al li la korpon de la animalo kiel envolvajo, libervole
prenis sur sin ŝarĝon, kiu estas malfacile portebla por tera
homo kaj kiu malofte trovas iun, kiu subiĝis al la „*falo*“ kaj
tamen prenas la ŝarĝon sur sin pro kompatado al la tera homaro.

Nur tiu, kiu tiamaniere estis preparata por esti „vorto“,
havas la rajton *instrui* siajn kunhomojn, kiam temas pri *plej
alta* instruado, kaj tiu *sekurigita instruado estis donata* al la ho-

maro en ĉiuj tempoj, per instruantoj, kies vorto estis bazita *en Dio*.

Neniu homo, kiun, de antaŭ jarmiloj, tiu ĉi tero portis kaj nutris, iam atingis sian *plej altan* celon, *neniu* iam atingis la *konscion de unuiĝo kun sia „vivanta Dio“*, *sen* la spirita helpo de tiuj ĉi instalitaj de la „Pravorto“ por helpi.

Nur *ilin* oni povas *fidi*, – kaj ĉu oni fakte havas iun el ili antaŭ si, pri tio la voĉo de la koro neniam permesas dubon, tiom longe, dum tiun voĉon ne supersonas trompaj instruoj, al kiuj oni iam malsaĝe transdonis sin, sen unue ekzameni ilin.

Tie ĉi, *miraklaj faroj* ne estas pruvo, kaj vera helpanto de liaj fratoj neniam parados per *fakiraj artoj*.

Certe, povas okazi, ke li majstras fortojn, kiuj al la plej multaj homoj ŝajnas „superhomaj“ kaj „miraklaj“, – sed tiaj „signoj kaj mirakloj“ estas *nur sekundaraj kromfenomenoj* de lia agado kaj kondiĉataj de, interalie, la specifa taŭgeco de lia psiko-fizika organismo, sed *tiuspeca* agado neniam povas pruvi, ke li estas *vokito*.

La akredititeco de iu vere instalita por helpado ĉiam estas trovata nur en tiu *plej interna interno de la helposerĉanto*, kiun povas sondi neniu plumbosondilo kaj en kiun neniam povas penetri la aktuala opinio aŭ la antaŭjuĝo de l' penso.

Kiu *tie*, ekzamenante la vortojn de sia instruanto, serĉas *respondon*, ne erarigite de iu memkreita instruo kaj ne ligite al iu opinio de aliuloj, tiu neniam lasos trompi sin de *falsaj* instruantoj.

Oni gvidos lin al la *fonto de vivo*, al tiu „*Pralumo*“, kiu ekkonas sin mem kiel „*Pravorton*“ kaj kiu „parolas“ siajn

„vortojn“ kiel *vivantajn spiritajn estaĵojn* de eterne ĝis eterne.

Kiel poeto formas el vortoj de homa lingvo kantojn, epojn kaj himnojn, tiel la „*Pravorto*“ formas al si el siaj „*vortoj*“, per sia krea forto, sian *eternan glorkanton* en la formo de nemezureblaj *hierarkioj de spiritaj estaĵoj*, kaj la lasta, *fina sono* de tiuj hierarkioj troviĝas en la fratoj de la „*Blanka Loĝio*“, kiu ekde pratempaj tagoj penas disvastigi *lumon* sur tiu ĉi tero, kaj kies membroj *solaj* posedas la *plenpovon de la spirito, atesti pri la spirito el plej profunda sperto*.

Tiel deiras de la „*Vorto*“, kiu estas „*Dio*“, de la *memelparolo de la eterna „Pralumo*“, ĉiuj radioj, kiuj iam surtere provis ekbruligi *lumon!*

Tio ŝajnas nekaptebla aŭ inda je dubo *nur al tiuj*, kiuj *ankoraŭ ne* posedas *internan enrigardon* en tiun *eston*, kiu estas sublima super ĉiu kapablo de prezentado kaj kiu en *plej alta* formaĵo de si mem ekkonas sin mem kiel „*Dion*“. –

Oni devas scii iom pri la *ŝtupoj* de tiu ĉi *eterna vivo*, pri ĝiaj *formoj de esto*, se oni volas esplori, kio vere estas „*Dio*“, kaj kiel la vivanta, *reala Dio*, senfine generante sin mem, eligas sin el la propra esto al eterne nova formo de esto.

Oni devas scii, kio *distingas Lin*, kiu *regas super ĉiuj altaĵoj kaj abismoj*, tial, *ke li ampleksas en si ĉion*, kio estas, disde tiu „*Dio*“, kiun la *homa fantazio* tiom ofte reve imagas al si en plej stranga formo.

Kelkaj homoj diris: „*Ĉio estas Dio!*“ – kaj: „*En ĉiu atomo de tiu ĉi fenomenaj mondo vi malkovru Dion!*“ – „*Ĉio ekstera de tiu ĉi mondo estas nur ŝajno*, kaj vere ĉiuj aĵoj estas ne aĵoj, sed *Dio!*“ –

Certe oni povas diri tion, *kaj se oni volas ĝustasense kompreni ĝin*, ĝi povas esti rigardata kiel *vero*, kvankam tiu ĉi vero restas alirebla al *tre erariga interpreto*.

Sed tia ludo per vortoj alportos nur malmulton da utilo por la homa intelekto.

Se oni volas veni al plej alta ekkono de la *vero*, tiam la *aĵoj*, kvankam ili ne *estas*, kio ili *ŝajnas*, devas resti *aĵoj* por ni kaj ne devas esti *diigataj* de ni, *eĉ ne en plej sublima maniero*. –

Alie ni riskas fari dian honoron al *manifestiĝa formo* de la eterna *vivo*, el kiu la Dieco formas sin eterne nove, nur tial, ĉar tiu manifestiĝa formo superas la komprenkapablon de l' homo. Sur tiu ŝtupo ni povas ligi nin tiumaniere, ke fariĝas al ni neeble, iam renkonti la *realan „Diecon“ en ĝia radiantaj majesto*.

Trioble eksteriĝas tiu ĉi eterna *vivo*, formanta la „nutraĵon“ de la Dieco, en siaj respektivaj manifestiĝaj formoj: – kiel *kosma fizika naturo*, kiel *regno de la flueganta animo*, kaj kiel la *reĝa regno de la spirito*.

Neniu „*kreanto*“ „*kreis*“ iun el tiuj regnoj!

Ĉio estas nur *manifestiĝa formo* de tiu *unu*, eterna *vivo*, kiu, estante *supera* al ĉiuj tri manifestiĝaj formoj, kristaligas *sin mem* en sia *plej alta* konscio kiel la „*Pralumon*“, kiu estas la esenco de tio, kion la homo kapablas tremsenti en si vere kiel la *prafonton de ĉiu vivo*, – kiel sian *vivantan „Dion*“.

Estante la kaŭzo de si mem en ĉiuj siaj manifestiĝaj formoj, tiu ĉi eterna *vivo* tamen trovas sian plej altan *eston plenumita* nur *super* ĉiu manifestiĝa formo, kvankam ĉiu el

ĝiaj *manifestiĝaj formoj* estas samesenca kun ĝi, sed servas kvazaŭ nur kiel *oceano de renoviĝo*, el kiu ĝi ĉiam denove *estigas sin mem el si mem*, per la *propra, memdonita* forto. –

Pri tio estas dirite: „*Kiel nutraĵon Brahmo formis tiun ĉi mondon*“, – sed oni tie ĉi ne pensu, laŭ ekzotera pensmaniero, pri formanto kaj lia formitaĵo, ĉar tiu ĉi vorto de la *Vedoj* diras al *scianto* multe *pli*: ĝi senvualigas al li la abisme profundan *realon*, senvualigas al li la *imanentan leĝon de mem-estigado de „Brahmo“*, la esencon de la *unu, absoluta* esto, kiu estas *eterna vivo el si mem*, kaj kiu, en siaj *manifestiĝaj formoj*, servas kiel „nutraĵo“ al sia *plej alta*, ĉion ampleksanta *memekkonado* kiel „*Dieco*“...

La imanentaj fortoj de la manifestiĝa formo de l’ eterna *vivo* agadas kiel *fizika kosma naturo*, eterne kreante formojn, kaj detruante formojn por fari novajn formojn.

Mondoj estiĝas kaj mondoj dispolviĝas en la kosmo en ĉiu tempo, sed neniam okazis „komenco“, kiu estus komenco *de la kosmo*; neniam okazos „pereco“ de tio, kio en si mem estas *vivo*, kio en si mem efikas kreeme kiel vivo kaj eterne ampleksas en si la estiĝon kaj pereon de ĉiuj mondoj. –

Kiel en *tiu ĉi* manifestiĝa formo de la eterna vivo ekzistas fortocentroj, kiujn neniu mikroskopo kaj neniu plej fajna instrumento de esploro iam povos senvualigi al la homa menso, tiel same ekzistas tie ĉi ankaŭ nevideblaj portantoj de plej alta *inteligenteco*, kiuj posedas kapablojn superantajn la forton de la plej potenca homa pensado tiom, kiom la pensokapablo de filozofo, okupanta la saman rangon kiel Spinozo aŭ Kantio, superas la pensadon de *praarbara homo*.

Sed *samtempe* ekzistas en tiu sama manifestiĝa formo de la vivo nevideblaj estaĵoj, kiuj posedas apenaŭ la „inteligentecon“ de la animaloj, kiujn la homo uzas kiel ŝargobestojn.

Sed ĉiuj ĉi nevideblaj estaĵoj tute ne estas de „*spirita*“ naturo, kaj *eĉ en siaj plej altaj formoj*, kvankam ilia individua vivodaŭro povas esti jarmiloj, ili tute ne estas „senmortaj“. –

Ĉio, kio konsistigas la fizikan videblan kaj nevideblan manifestiĝan formon de la eterna *vivo*, estas al ili, kiuj plene estas *intelekt*o, malfermita ĝis la plej malgranda detalo.

Sed ĉio, kio *etendiĝas super* tiu ĉi manifestiĝa formo, nome: la tuta nemezurebla *regno de la flueganta animo* kaj la *regno de la spirito*, estas por ili nur absoluta *nenio*. – –

Ili konas neniun „Diecon“ kaj ili malestimas la homan intelektan strebadon por *pruvi* la „ekziston de Dio“, ĉar ili scias, ke *por la intelekto* iu „dio“ fakte ne ekzistas...

Al ilia influo estas atribuenta ĉiu trotaksado de *homa pensado*, ĉiu hipertrofio de la *intelekt*o en la homaro.

En la *fizika* manifestiĝa formo de la eterna *vivo*, la vivo ekkonas sin *mem* nur kiel *fizikan kosman naturon*, sen konsciiĝi en si mem pri siaj *pli altaj* manifestiĝaj formoj kiel *animo* kaj *spirito*.

Estante akre apartigita disde la manifestiĝa formo de *fizika kosma naturo*, *apartigita disde ĝi* per netranspontebla fendego de sentemeco, kaj tamen *trapertrante* tiun unuan manifestiĝan formon, malkaŝas sin la regno de la *flueganta animo* kun siaj infinitoblaj formoj de sentantaj fortoj kaj estaĵoj.

Ili ĉiuj estas „konsciaj“ kaj pri la ekzisto de la *fizika kosma naturo* kaj pri la ekzisto de la *spirita* regno, „konsciaj“ en la

senco, ke ili *sentas la efikojn*, kiujn ili kapablas *percepti* el ambaŭ regnoj.

Estante akre apartigita disde la *regno de la flueganta animo* kaj disde la *regno de la fizika kosma naturo*, kvankam *trapenetrante* ambaŭ manifestiĝajn formojn de la eterna vivo, troviĝas la *regno de la spirito* kun siaj nemezureblaj hierarkioj de *memkonsciaj, memsentantaj, pensantaj, sentantaj kaj per rekta „vidado“ ekkonantaj, eternaj, pure spiritaj estaĵoj, kies individueco estas nepereonta*, – la *plej alta* formo de *multeco-sentado* en la eterna vivo.

En neimageble longa vico da ŝtupoj, *unu* rondo de perfekt-eco leviĝas super *alia*, ĝis – se paroli en homa maniero – la *plej alta pinto* de tiu lumkonuso radias en la *memkonscio de la eterna vivo* en *plej alta ekkono de si mem*, kiu ampleksas *ĝian tutan eston*, kaj, fariĝinte konscia en la „*Pralumo*“, spertas la *eston* de la *Pralumo* kaj en ĝi fariĝas la „*Pra-vorto*“, la *mem-elparolo de la absoluta esto*, kiu siaflanke estigas *vivon en ĉiuj tri manifestiĝaj formoj* de la eterna vivo.

Tie ĉi ni alvenis ĉe la *fonto de vivo*, la fonto, kiu eterne fluas *el si mem*, kaj eterne *refluigas en sin* tion, kio elfluis el ĝi.

Mi bone konscias la fakton, ke homa parolado neeviteble devas fariĝi balbutado, se oni provas priskribi tiujn ĉi aferojn, kiuj estas kaptablaj nur en spirito kaj per *rekta „vidado“*, kaj tamen mi kredas, ke kelkaj legantoj eble spertos – pli bone ol se mi estus silentinta – kvazaŭ de fore iometon da *milda eks-cio*, kiun ilia interno *konfirmas* per ĝoja resonado, kaj kiu malfermos al ili la vojon al la plej alta spirita celo de l' homo, kiun celon mi penis montri tiom diversmaniere. – –

Certe, ĉi tie ĉio estas donita nur per *aludo*, sed oni ne forgesu, ke tie ĉi la plej multaj aferoj *tute ne estas lingve esprimebla*, tiel ke ĝi *restus sekreto eĉ tiam*, se mi skribus dikan *libron* pri ĉiu *vorto* tie ĉi uzita. Pro plej profunda respekto antaŭ la nekapteble sublima objekto de mia traktaĵo, mi laŭeble evitis ĉiujn konvenciajn vortkreaĵojn, kiujn homa pensado faris al si tie, kie ĝi provis *spekulative* ekkoni eternajn aferojn. –

Mi pensas, ke mi plenumis tion, kion la titolo de tiu ĉi traktaĵo promesis, sed tiros utilon el mia instruo *nur tiu*, kiu *mem* ekiras por serĉi la *fonton de vivo* kaj ne ripozas, ĝis li trovis ĝian spuron en si, kvankam ĝia „vivanta akvo“ povas alflui al li nur tra *tiu*j kanaloj, kiujn ĝi *mem preparis al si*, por fariĝi *kaptebla* por la surtera homspirito malgraŭ ties „falo“, por ke li postulu *pli* da ĝi, por iam, post eonoj, ĝui *la tutan abundon de la eterna vivo* tra ĉiuj eternecoj.

Kiu iam sur Golgota perdis sian vivon kaj mortante *nove direktis plej altan amoforton el praaj profundoj en la surteran ekziston*, tiu *pretigis*, al ĉiuj vere volantaj sekvi lin, la vojon kiu kondukas al la *fontoj de vivo*.

Kion li iam faris por la homaro, tion povas kompreni nur *tiu*, kiu ekiris sian *propran liberigan vojon* kaj tiam sentas la *forton*, kiu alfluas al li, sur tiu vojo, per la faro de la „granda amanto“...

Tia homo ankaŭ scios, kion signifas la parolo de la alta majstro:

„Kaj mi, se mi estos *suprenlevita* de sur la tero, altiros al mi ĉiujn homojn.“

Nur tia homo estos kapabla uzi la „magnetan“ forton, kiu retiras en la praeston, kaj kiun tiu lumanto iam elkatenis per sia senlima amo!

La neebleco „fariĝi membro de la Blanka Loĝio“

Kvankam mi priskribis plej klare, ree kaj ree en multaj lokoj, la naturon kaj esencon de tiu spirita komunumo, kies membro mi estas, pro kio doniĝis al mi la neevitebla tasko disvastigi ĝiajn *instruojn*, mi ĉiam denove ricevas la demandon, „sub kiuj kondiĉoj“ oni povus fariĝi membro de tiu komunumo, t.e. la „*Blanka Loĝio*“.

Kelkaj el la demandantoj strange ankaŭ raportas, ke iu diris al ili, ke mi faris lin membro de la „Blanka Loĝio“.

Mi vere apenaŭ povas kompreni, ke inter la personoj tie ĉi konsidereblaj povus troviĝi eĉ unu sola, kiu estus subfalinta al tiu eraro.

Sed kiel ajn la afero estas, mi per tio ĉi sciigas al ĉiuj mian definitivan konstaton, ke mi *neniam povus fari iun personon, kiu ajn li estas, membro de la spirita komunumo, kiun oni nomas „Blanka Loĝio“, kaj tial neniam povis diri al iu persono, ke mi faris lin „membro de la Blanka Loĝio“, kaj ke mi neniam povas proponi iun personon kiel kandidaton por membriĝo.*

Tia konstato ŝajnas esti necesa, kvankam mi nemiskompreneble diris, ke dum sia surtera vivo *neniu homo iam povas fariĝi* membro de la „Blanka Loĝio“, sed ke ĉiu el ĝiaj membroj jam *naskiĝas* kiel tia, post kiam li en sia spirita ekzisto, jarmiloj antaŭ sia terhoma naskiĝo, *prenis sur sin la devojn, kiuj solaj decidas pri membreco en tiu ĉi spirita rondo.* –

Oni prave devus supozii, ke ĉio ĉi ne estas tro malfacile komprenebla por homo, kiu entute okupiĝas pri spiritaj aferoj.

Sed antaŭ ĉio oni devus povi premi iom pli klaran koncepton pri la ŝanĝoj en la *spiritiva vivregiono*, kiujn ia „membriĝo“ en la „Blanka Loĝio“ devus kuntreni, se ĝi fakte estus *ebla* dum la surtera vivo.

Ĉu oni vere pensas, ke tia „membriĝo“ – *supoze*, ke ĝi *estus* ebla, – rezultigus neniun alian efikon ol la membriĝo en iu ajn religia komunumo?

Ĉiu, kiu iam legis, kion mi skribis, ja devas scii, ke tie estas parolate pri la plej diversaj *spiritaj fortoj*, kiujn posedas la veraj membroj de la „Blanka Loĝio“, pri la plej diversaj *spiritaj kapabloj*, kaj antaŭ ĉio pri la *konstanta spiritiva interkomunikiĝo!*

Tial, plej simpla logika pensado devas diri ankaŭ al homo kaptita de tiu stranga eraro, ke li devus *esti rimarkinta* ĉion ĉi *en si*, se li *estus fariĝinta* membro de la „Blanka Loĝio“. –

Tie ĉi montriĝas *treege* naiva imagaĵo pri la *reala spiritiva vivo!* – Oni evidente konfuzas la spiritan spertadon, kies „realeco“ estas sentata multe pli forte ol la ŝajne kompakta realeco de *fizika* spertado, kun iuj fantaziaj imagoj, kun speco de maldorma revado, kun halucinoj aŭ efikoj de „spiritismaj“ influoj, ne suspektante, ke homo, kiu kapablas vivi konscie en la realaj *spiritaj* mondoj, konas *plene aliaspecan* vivon, kompare kun kiu *ĉio*, kion oni laŭ ĝenerala lingvouzo nomas „spiritiva“ vivo, montriĝas tute pala, ombreca, artefarita kaj nereala!

Se oni ne *mem vivas* tiun realan spiritan vivon, oni *eĉ ne povas* „imagi“ ĝin, sed pere de la ekzaktaj priskriboj, donitaj en tiom multaj lokoj de miaj libroj, oni devus iomgrade kla-

riĝi, almenaŭ en *intelekta* maniero, pri tio, ke ĉi tie temas pri *tio plej alta reala*, kio iam povas esti spertata!

Krome, la demando pri la „*kondiĉoj de membriĝo*“ en la „Blanka Loĝio“ kaj la propono fondi „filajn loĝiojn“, montras, ke homoj konantaj diversajn „okultajn“ aferojn opinias, ke temas pri iu ekstera societo, kiu dediĉas sin al la flegado de la mistiko aŭ de la okultismo, ekzemple laŭ la antikvaj ordenoj de iluminatoj aŭ la loĝioj de la framasonaro.

Al tiu eraro eble atribuis la esprimo „Blanka Loĝio“, pri kiu oni scias, ke ĝi estis formata *ne de mi*, sed kiun mi retenis, ĉar ŝajnis al mi, ke vastaj rondoj ligas kun ĝi nocion, kiu preventas la estiĝon ĝuste de la eraroj supre menciitaj.

Entute ja montriĝis, ke la reteno de tiu ĉi esprimo estis *necesa*, ĉar alie estus povinta estiĝi la konfuziva opinio, ke ekzistas *apud* la spirita komunumo, el kiu mi parolas, ankaŭ *alia* spirita komunumo, kiu nomiĝas „*Blanka Loĝio*“.

Por ke ankaŭ tie ĉi malaperu absolute ĉiu ebleco de eraro, jen alia definitiva konstato en sekaj vortoj:

La spirita komunumo, kies membro mi estas kaj pri kiu mi sciigas, estas *realspirita* unuiĝo, – *mult-unueco de spiritaj* estaĵoj, el kiuj la plej multaj aŭ neniam portis terhoman korpon, aŭ jam antaŭ longe postlasis ĝin al la fizika tero; sed en ĉiu tempo *kelkaj* el ili vivas kaj agadas *en la korpo de la homo de tiu ĉi tero*, ekstere diferencante de siaj kunhomoj en *neniu* maniero kaj per *nenia* liberigo el la naturaj leĝoj.

Sed grandega diferenco ekzistas rilate al la *interna* vivo!

Dum niaj kunhomoj povas percepti nur la eksteran fizikan mondon kaj la vivon de la animoelementoj, sed plejbona-okaze *suspektas* la ekziston de la realaj *spiritaj* mondoj, tiuj ĉi mondoj estas malfermitaj al ni plenkonscie ĝis la plej altaj

ŝtupoj, kiuj ankoraŭ permesas samtempan vivon en la terhoma korpo.

Ni spertas en la sama tempo la eksteran fizikan mondon, la mondon de la animoelementoj *kaj* la realan spiritan mondon, sen bezoni alian preparon ol la konscian direktiĝon al tiu aŭ tiu ĉi vidkampo.

Ni spertas la spiritajn mondojn ne en „ekstazo“ aŭ en alia nenormala stato, sed estante sobraj kaj maldormaj, sen tio, ke iuj eksteraj signoj povus malkaŝi al hazarda ekstera observado, ke en la koncerna momento nia konscio direktiĝas ne sole al tio ekstera.

Krome, ni estas en permanenta, konscia, spirita komuniko, kvazaŭ konstanta elektra kurento senĉese cirkuladus tra ni ĉiuj, ankaŭ tiuj *ne* vivantaj en terhoma korpo.

Se ni renkontiĝas, la ekstera renkontiĝo direktiĝas nur al la ekstera tera homo.

En *spirita*-reala maniero ni ĉiuj povas fari nin reciproke *videblaj kaj aŭdeblaj* per nura ago de volo.

Ni havas specon de „centra punkto“ sur la tero, en kiu ĉiam kelkaj el ni kunvivas en plej profunda izoleco de la cetera mondo, sed ni ne havas eksterajn „kunvenojn“, ĉar tio estas tute nenecesa pro nia konstanta spirita interkomunikado.

Tial ni sekvas *neniujn eksterajn ritojn*, konas *neniujn ceremoniojn*.

Ni scias sen iuj eksteraj signoj, *kiu* apartenas al nia rondo.

Neniu *povas* aparteni al ni, kiu, kiel supre dirite, ne apartenis al ni jam antaŭ sia naskiĝo en terhoma korpo.

Lia „membriĝo“ estas nenio alia ol la sekvo de la devoligo, kiun li libervole prenis sur sin jarmilojn antaŭ sia naskiĝo.

Tiu devoligo okazas en *spirita* stato, kiu restas fremda al la tera homo, kvankam ĉiu surtere naskiĝinta iam travivis ĝin.

Ankaŭ la membroj de nia *spirita* unuiĝo scias pri tiu iama stato de ilia esto nur en sia pure *spirita* esenco per rekta rememoro.

La tera korpo kaj la animaj kapabloj de tia homo unue devas iom post iom, sub la gvidado de perfektigintoj, esti taŭgigata por la transmitado de la spiritaj fortoj kaj kapabloj al la konsciosfero de lia volo, sed tiu ĉi „instruado“ okazas *de interne*, eĉ se la „frato“ gvidanta la disvolviĝon ekstere videble montriĝas en sia tera korpo.

La membroj de tiu ĉi spirita unuiĝo surtere vivantaj ne estas „sanktuloj“ kaj ne malproksimaj de homa pekado.

Ni ankaŭ ne estas „fakiroj“, t.e. ni *neniam kaj en neniaj cirkonstancoj* okupiĝas pri iuj „okultaj artoj“, pri ceremonia magio aŭ pri similaj aferoj, kvankam ni bone konas la koncernajn eblecojn kaj kvankam ni povus ĉiam esti certa pri sukceso.

Ni agadas nur per la fortoj de la realaj spiritaj mondoj, t.e. ni estigas laŭ strikte devoligantaj *spiritaj* leĝoj *spiritajn kaŭzojn*, kies sekvoj rezultigas certajn ŝanĝojn, bonfarajn por la homaro, en la anima kaj fizika mondoj.

Ni agadas tute ne nur laŭ propra bontrovo, sed kiel plenumantoj de pli altaj spiritaj ordonoj, kiuj siaflanke konformas al difinitaj kondiĉoj kaj nur ekstreme malofte povas esti modifataj per niaj deziroj.

Oni vidas, ke tie ĉi vere ne temas pri „rondoj de adeptoj“, pri pli aŭ malpli religie kolorigita „sekreta societo“, pri lernejo de „sekreta scio“, aŭ entute pri „*ekstera*“ korporacio bazita sur konstitucio aŭ statuto.

Certe, tiuspecaj *eksteraj* unuiĝoj iam metis sin *sub la gvidadon* de tiu pure spirita unuiĝo, sed *neniam* iu el ĝiaj membroj *apartenis* al tia ekstera unuiĝo, – krom kiel *spirita* gvidanto.

Kiom ajn mistere sonas la raportoj pri eksteraj, sekretaj komunumoj, oni *neniam* devas supozi, ke temas pri la „Blanka Loĝio“.

La „Blanka Loĝio“ estas io *tiom esence alia*, io *tiom unika* kaj *tiom kaŝa*, ke ĉia serĉado en la ekstera homa komunuma vivo rezultigas nur eraron kaj konfuzon.

Zorgeme serĉanta observanto de la homara historio kelkfoje povas trovi sole la *sekvojn* de la bonfara spirita agado de tiu ĉi mult-unueco.

Por fine dispeli la lastajn eblecojn de eraro, estu eksplicite dirate, ke la membroj de tiu spirita unuiĝo ofte ja agis en la homaro *per la skriba vorto*, sed ke, antaŭ ol oni donis al mi la spirite devoligan komision, *neniam estis malkaŝe parolite aŭ skribite pri ĉiuj ĉi aferoj en lingvaĵo komprenebla al ĉiuj*, kiel nun estas farate de mi, kaj ke pli ol unu jarmilo pasos, antaŭ ol iu venonta el miaj fratoj en spirito povas daŭrigi mian laboron. –

Ke ankaŭ tiu ĉi ekstera agado estas *parto* de la ĝenerala plano de *spirita* agado, al kiu servas la „Blanka Loĝio“, estos senpere klara al komprenemulo. –

Kiom ajn multe mi laŭordone devas diri, mi tute ne kontestas, ke *multe pli*, eĉ hodiaŭ, *devas resti sekreto* kaj por ĉiam *restos* sekreto, ĉar ĝi povas esti konfidata nur al tiuj sur la tero, kiuj laŭ sia propra volo trakuris provadon daŭrintan jar-

jarmilojn, antaŭ ol ili povis ricevi la teran veston de homo en ventro de patrino.

Mi esperas, ke tiuj ĉi eksplikoj sufiĉos por meti definitivan finon al la demando, kiel oni povas „fariĝi membro“ de la „Blanka Loĝio“, kaj ke ili krome alportos klarigojn, kiujn eble multaj homoj deziras. –

La instruoj peritaj de mi *portas sian veron en si mem*, sed ili povas senvualigi tion sian plej profundan nur al *tiuj*, kiuj volas *sperti* tiun veron en sia propra vivo. Ankaŭ tiu ĉi libro tiumaniere fariĝu sperto al multaj homoj!

Nur se ĝi fariĝas *sperto*, nur se ĝiaj instruoj estas levataj el la sfero de teoriaj konsideroj por penetri la *ĉiutagan vivon*, ĝi povas malfermi la okulojn al legantoj por la *liberigo* el la nokto de neekkonado ...

La scio pri iu instruo kondukanta al la vivo alportas liberigon nur tiam, se la scianto efektive *aplikas* la instruon en siaj *vivo kaj farado*.

Tiu, kiu iam kiel vera arkipastro tiris malsupren la profunde misteran benon sur ĉion portantan homan vizaĝon, – li, kiu sur Golgota plenumis la plej altan agon de amo, – kion alian li volis ol tion, ke lia instruo *trovu aplikiĝon* en *aktiva vivo*?

Se tiu ĉi libro komprenigu al vi la misteron de amo, kiun tiu senkompare amoforta homo elfaris en sia tera morto, ĉiuj miaj vortoj tamen povas efiki nenion tiom longe, dum vi mem ne provas *sperti* en vivo kaj agado la verecon de miaj vortoj.

Lia instruo fluis el la sama fonto, kiel la vorto, kiun *mi* donas al vi.

Se vi volas kompreni tion, kio tie ĉi estu komprenata, tiam vi devas esti preta dediĉi vian tutan vivon al *realo*, kiu neniam fariĝas ekkonebla al iu, kiu ne provas, simple kaj sen ĉia aroganteco pri scio, trovi ĝin *en si mem*, en *propra spertado*.—

Sed tiam vi estos por ĉiam *ŝirmita en la vero!*

Tiam vi spertos tion, kion signifas la esprimo: esti *en la eterna vivo!*

Tiam vi mem fariĝos *atestanto pri la vero!*

*

*

*

Malsaĝaj elpensajoj

Obeante al la origino de mia spirita esto, mi tie ĉi estas devigata averti emfaze kontraŭ speco de „mondrigarda literaturo“, kiu pli kaj pli disvastiĝas kaj sugeste kaptas pli kaj pli vastajn rondojn da serĉantoj, sed, vidate ĉe lumo, ĉiu tia libro estas nenio alia ol amasiga *kolekto de nematuraj fruktoj de legado*, ĉiufoje aranĝita en nova, kurioza maniero.

Kelkaj aŭtoroj de tiaj literaturaj produktoj apartenas al la stranga speco de homoj, kiuj ne povas traserĉi kvin librojn sen senti en si la certecon, ke ili havas la rajton, kaj la maturrecon por, nun mem skribi sesan libron pri simila temo.

Aliaj efektive legis preskaŭ ĉion, kion homa mano iam skribis kiel elpensitan aŭ kredatan solvon de *tiuj* demandoj de la intelekto aŭ koro, kiuj aspiras al io troviĝanta supre de mondo, en kiu sufero kaj morto embuskas malantaŭ ĉia ĝojo kvazaŭ timigaj fantomoj.

Impresa erudicio akirita per legado ofte ligiĝas al bone trejnita spekulativa pensado kaj al tre elokventa stilo de verkado, sed tiuokaze la verkanto mem eble ne rimarkas, ke li skribas – nur elverŝante sian koron – tion, kion lia interno volas „eligi“, ke lia cerbo riskas la plej bizarajn pensosaltojn, nur por ke la kapo finfine liberiĝu de la kaoso de fruktoj amasigitaj en la memoro el ĉiuj kampoj de pensado, ĉiuj ĝardenoj de homaj kredinstruoj.

Eĉ alte impona, serioza scio *en la plej strikta senco de sobra scienco* neniel protektas kontraŭ la sama memtrankviligo, estigita de interna mizero kaj akompanata de la tro certa

memkredigo: – ke la *realo* „devas“ esti konforma al la elpensita *vortigo*.

Sed la realo estas ĉiel *nedependa* de la imagaj bildoj kaj pensaj konstruoj, kiujn la homa cerbo reproduktante kreas kaj el kiuj ĝi konstruas *sian* mondon.

La abundo da teraj ekkonoj, kiujn la pensado povas *ellabori* kaj la imago *ekspliki*, ne devas forlogi al la supozo, ke la atingitaj *pensorezulto* kaj *ekspliko* estas instrumentoj, per kiuj la *realo* povas esti ŝanĝata.

Neŝanĝebla, konforma al sia propra leĝo, la realo mokas ĉiun intencon doni al ĝi *alian formon*, kaj neniu homa spirita forto kapablas *ŝanĝi* tion, kio vere *estas* realo, kvankam sufiĉas tre malgranda prudento por fari al si malsaĝajn elpensadojn, pri kiuj la homo *kredas*, ke per ili li povas servigi la realon al si.

Pri tiaj malsaĝaj elpensadoj temas senescepte en speco de literaturo, kiun tie ĉi miaj vortoj celas.

Tiuj skriboj kaj traktaĵoj restas ankoraŭ relative sendanĝeraj, se ilia malsaĝeco estas tiom evidenta, ke ankaŭ homo neinformita kaj neavertita tuj malkovras ĝin.

Sed multe pli da malfeliĉo estas alportata de libroj, en kiu fanatika menso, trejnita al metoda logika prezentado, *almiksas* al la gelatenaĵo de siaj elpensadoj diversajn fragmentojn de ekkono, kiuj *fakte estas* pecoj de la vera bildo de l' realo.

Tiam la leganto, trovante tiujn fragmentojn en la mola maso, sentas ion *solidan*, – sentas kun certeco, ke *tiuj ĉi* partoj de la prezentaĵo devas konformi al la vereco de la realo, kaj sekve nememgardeme kuraĝas fari la konkludon, ke tiam

probable la tuta tremetante ĝeleca miksaĵo estas vera atesto pri la realo. –

Sekvas la timo, ke per propra provado kaj konsiderado oni eble suferos perdon de iu vero, kaj kiam oni falis sub la *influo*n de tiu timo, laciĝas kaj fine lamiĝas la propra *kritik-kapablo*, kiu eble estus povinta liberigi la lerte allogitan viktimon.

Ekzistas ne malmultaj alte respektindaj viroj kaj virinoj, kiuj iam kiel sinceraj serĉantoj esperis trovi la veran bildon de la realo, kaj tiam en la priskribita maniero perdis sian liberecon por sia tuta surtera vivo.

Tie ĉi mi nur alude mencias la malŝparon de nacia kapitalo praktikatan en preskaŭ ĉiu „civilizita“ lando en la mondo por tiumaniere konfuzi la kapojn, kaj enpremi *timon* en la korojn...

Ŝajnas, ke neniu el la aŭtoroj de la tie ĉi celita speco de literaturo metas al si la demandon, ĉu li post sia tera morto povas *respondeci* pri tio, kion li instruas per tiom sugesta voĉo, kaj pri kio li eble *opinias*, ke li povas respondeci pri ĝi antaŭ si mem. –

Por multaj el ili tiu demando havas malmultan intereson, ĉar en la *plej malkaŝa* parto de ilia pensado ili sekvas la tezon, ke la morto de la tera korpo ĉiuokaze finas ĉian spertadon.

Sed ankaŭ tie, kie la *elpensinto* estas samtempe la *sklavo* de sia memkreita miksaĵo da imagoj, nenio ŝajnas esti pli malproksima ol la plej milda dubo pri la propra rajto je *disvastigo*.

Tie kaj ĉi tie mankas la *konscio pri respondeco*, kaj kun amara doloro mi devas aldoni, ke ankaŭ admirinda *poezia*

verkado tute ne estas kapabla paralizi la venenajn efikojn, al kiuj la anima organismo estas elmetata ĉie, kie oni parolas pri la finaj aferoj sen esti vokita aŭ rajtigita, kvazaŭ jen estus temo, kiun oni povus variigi laŭ gusto kaj kaprico ...

Eble estas kompreneble, se zorganto pri animoj, kiu agadas en la servo de kredkomunumo, devante konsideri la imagaron de ĝiaj membroj, plue instruas tiel, kiel oni instruante diris al li, ke li *devas* instrui, kvankam jam antaŭ longe lia ekkono kreskante *superis* tiun instruon, – sed libera verkanto, kiu estas ligita nur al sia arto, apenaŭ povos same atendi komprenon kaj pardonon, se li uzas prasanktajn esprimojn kaj vortojn por servi al la tago, kiam tiu tago, malproksima de adorado, postulas dekoracion, kiu devas trompe kaŝi sen-signifan kalkaĵon. –

La homaro de tiu ĉi tempo vere ankoraŭ *ne* „dekadencis“, eĉ se profesiaj grumbluloj deziras aserti tion.

Eĉ la ĝisnuna nekapablo de la popoloj gajni la respekton de alia popolo *aliamaniere* ol per la estigo de timo antaŭ la plej horojaj neniigiloj, estas vera „*nekapablo*“, ne dekadenco!

Tiu ĉi homaro ankoraŭ ne estas *kapabla kompreni* la *sencon* de siaj mekanikaj atingiĝoj de la lastaj cent, kaj eĉ malpli de la lastaj *kvindek* jaroj!

Ĝi sekve ankaŭ ne estas kapabla vere *regi* tiujn atingiĝojn kiel *posedaĵon*, sed ĝis nun estas „*obsedata*“ de tio, kion ĝi sukcesis akiri ...

Kiam tiu ĉi fantoma stato estas superita, tiam aperos ankaŭ la kapablo malkovri la pra-fundajn *spiritajn* instruojn, kiuj

atendas malkovron malantaŭ ĉiuj teknikaj inventaĵoj de la moderna tempo. –

Sed jam hodiaŭ homo kun nefermita menso povus tiri el la kampo de teknikaj atingaĵoj la instruon, ke nura scio bazita sur la aksiomoj en kompendioj pri mekaniko tute ne sufiĉas por tie ĉi percepti la *realon*, kiu unue devas esti *ekkonata*, antaŭ ol la kalkulanta inĝeniero povas komenci sian laboron, se li volas sukcesu.

Nur se li scias zorge *konformigi* sin al la neinfluebla realo, la maŝinoj elpensitaj de li estos utiligeblaj.

Tiel same ĉiu elpenŝaĵo de tro vigla fantazio estas tute ne-uzebla, se ĝi celas *tiuajn* aferojn, kiuj devas resti nealireblaj al niaj terkorpaj sensoj hodiaŭ konataj kaj kutimaj.

Ankaŭ tie ĉi, homo unue devas esti sperta pri la *realo*, antaŭ ol li povas esti certa, ke lia prezento ne faligas la animojn en plej sovaĝan konfuzon.

Sed en ĉiu tempo ekzistas, inter ĉiuj milionoj da homoj de la diversaj rasoj, nur kelkaj viroj, kiuj naskiĝas tiumaniere preparitaj, ke la realo povas *montri* sin al ili, kaj ke ili povas *elteni* la vidon de la realo. –

La parolo de la antikvuloj: – „*Kiu vidas Dion, tiu devas morti!*“ – estas profunde prava por preskaŭ ĉiuj homoj, kaj eĉ la ekstreme malgranda grupo de vere preparitaj homoj devas submeti sin al tiu ĉi frazo, kvankam ili devas senti ĝian veron nur en mildigita grado ...

Same kiel iu alia tera homo, mi ja vere ne estas la *estiginto* de tiuj ĉi cirkonstancoj, sed, starante meze de ili, povas nur *atesti* ilin.

Ke homa fantazio kapablas „imagi“ ĉion ĉi ankaŭ en *alia* formo, neniel ŝanĝas la fakton, ke la realo restas tia, kia ĝi *estas*, kaj ke ĝi konformas nur al sia propra, imanenta leĝo.

Se mi tie ĉi devas averti kontraŭ nevokitaj instruantoj, mi inklinas esperi – homece kunsentante –, ke apenaŭ unu sola inter ili eĉ nur iomete suspektas, kion li jen transdonas al sia pensado kiel ludilon.

Vera scio pri la *sekvoj* ne dissolveblaj en jarmiloj gardus eĉ la plej senkonsciencan literaturan aventuriston kontraŭ la plano disvastigi la inventaĵojn de sia imago kiel veran bildon de la *realo* ...

En mitoj kaj legendoj, kiel en diversaj instruoj de malnovaj religioj, tiu ĉi vera bildo de la realo estas ankoraŭ trovebla, kvankam ĝi hodiaŭ estas tiom kovrita de kalkaĵo kaj nigrita de kandela fumo, ke oni bezonas penon kaj zorgemon por ankoraŭ iomgrade ekkoni ĝin.

Tamen multo ankoraŭ atendas malkovrantojn, kiuj scias lertamane revidebligi tion hodiaŭ preskaŭ nekkoneblan, ĉar la estigintoj de la malnovaj altaj kultoj sciis, ke „kiu vidas Dion, tiu devas morti“, kaj tial kreis la verajn *bildojn* de la realo por ĉiuj, kiuj esperis trovi sian vivantan Dion *en si mem*, kie li povas esti ne „vidata“, sed ja *sentata* en ĉiu atomo de la animo, en ĉiu ĉelo de la korpo, donacante *benon, forton kaj iluminadon*. –

Ankaŭ la granda amanto, la heroo de Golgota, estis „*vidinta*“ Dion, estante homo siatempe preparita por tio, – kaj ĉar li sciis, ke li povis peri al sia popolo vidaĵon de la al li konata realo nur en veraj *bildoj*, li instruadis preskaŭ ĉiam per bildoj kaj paraboloj.

Sed kelkfoje li provis transpasi bildon kaj parabolon per vortoj, kiujn liaj disĉiploj estis apenaŭ atendintaj de li.

„Malfacila estas tiu parolo; kiu povas lin aŭskulti?“

Vere estis tre „malfacila“ la parolo, kiun la majstro instruis al ili kun matematika akreco:

„*La regno de Dio estas en vi.*“

Ili havis *alian* „imagon“ pri tio.

Ne malpli malfacile estis por ili, sekvi lian parolon:

„Mi kaj la Patro estas *unu*. Tiu, kiu vidis *min*, vidis ankaŭ *la Patron.*“

Sed:

„La Patro estas *pli granda* ol mi.“

Tiuj vortoj estas preskaŭ timige proksimaj al la realo, tiel ke ili certe devis ŝajni dubindaj al la „malgrandfiduloj“, aparte pro tio, ĉar ili ankoraŭ ne povis suspekti, kiom bele la kristana „teologio“ iam scios interpreti tiajn frazojn.

Hodiaŭ oni devas tre *konscie forgesi* tiujn interpretojn, se oni volas lerni kapti la sencon de la frazoj mem. –

Sed multe pli grava ol la celo: ĝuste interpreti la postrestintajn verajn parolojn de la alta majstro, estas la redirektiĝo de la tuta propra surtera vivo al la „regno de la ĉieloj“ *en ni mem!*

Eĉ se neniu alia vorto de la granda amanto estus konservita, sufiĉus sole la indiko, ke la vera regno de la ĉieloj estas trovebla por ĉiu tera homo nur *en li mem*, – tiel, kiel ĝuste *li* povas sperti ĝin, tiel, kiel ĝuste *lia* forto povas spirite kapti ĝin. –

Sed ĉi tie ĉiu interpretemo devas teni sin en respektoplena malproksimeco!

Temas pri *la regno de la ĉieloj*, – pri la regno de la mondoj de l' esenca, eterna spirito, – ne pri la pia sento, ke oni supozas plaĉi al Dio! –

Kaj nur *en ni mem* estas malfermitaj al ni la ĉieloj, kiuj iam fariĝu al ni eterna hejmo. – –

En ni estas la enirejo al ĉiuj spiritaj regionoj, ĉar tio nia propra spirita estas trapenetrita de ili ĉiuj.

Sed ankaŭ nur *en vi mem* vi estas ricevata en *tiun* „ĉielon“, kiu konformas al via propra konscikapablo, kaj tiu kapablo povas havigi al si signaturon kaj gradon nur *per viaj farado kaj agado* en la medio konforma al vi!

Tuj kiam via tera korpo ĉesas servi al vi, vi devos kontentiĝi per *tiu* „ĉielo“, kun kiu via konduto al vi kaj al viaj kunhomoj faris vin akordigebla, kaj nur post nekomprenoble longaj tempoj vi povos esti ŝanĝata tiom, ke ankaŭ pli alta regiono de la esencaj spiritaj mondoj povas iam fariĝi spirite kaptebla al vi.

Ne *nur* al vi mem vi dediĉu en tiu ĉi surtera vivo viajn fortojn, vian potencon kaj vian zorgon, sed ankaŭ ne *nur* al la aliaj homoj!

Ankaŭ ĉi tie vi devas kalkuli kun senindulgaj leĝoj ...

Ju pli vi scias proksimiĝi al la harmonio, kiun *spirita* leĝo postulas de vi, des pli vi gajnos.

Mi profunde deziras, ke vi sukcesu teni en ordo viajn spiritajn „debeton kaj krediton“ tiel, kiel bona komercisto en la mondo de teraj valoroj postulas de si, ĉar tiam vi certe neniam devos penti pri via surtera agado!

*

*

*

Fino

Esperanto-tradukoj de pliaj libroj
el la instrua verkaro de Bô Yin Râ
estas elŝuteblaj je la retejo:
<http://boyin-ra.org/esperanto/>